



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Julio 2017 n-ro: 19



Nia kara japana amiko kaj organizanto de Esperanto-Sumoo, HORI Jasuo, sendis al ni amindan mesaĝon kaj ni volis kunhavigi ĝin kun vi.

"Karaj,

En nia sumoo partoprenas gelnantoj de **La Chaux-de-Fonds, Svisujo**.

Al ili mi sendis japanan puparon de mia filino. Tiu puparo por knabina tago longe dormis en la sranko, car mia filino ne volas gin. Mi a etis in anta pli ol 30 jaroj, kiam mia filino estis juna. Mi ne povis/volis for eti in, sed mi ne plu povos konservi in, ar mi estas maljuna, kaj mi ekpensis donaci in al tiu lernejo. Instruistino Monika, kiu

respondecas pri la sumoo, konsultis la lernejestron kaj oni decidis ricevi in.

En tiu majo la gelnantoj havis la feston pri Japanio, klarigante Japanion kaj japanan kulturon al la vizitantoj. Monika sendis fotojn, kiuj tre kortu is min. Mi volas dividi mian ojon kun vi, do mi dissendos la fotojn al la sumooistoj.

HORI Jasuo"

Merhaba,

Temmuz sayımızda birbirinden ilginç yazılar var dergimizde, ancak aşağıdaki şu üç çok önemli yazıya dikkatinizi çekmek istiyoruz:

- 1) "Ertuğrul Zirhlısı" Japonya'dan Egawa Harukumi
- 2) "Krezus ve Solon" Yunanistan'dan Spiros Sarafian
- 3) "Kürk Mantolu Madonna" Türkiye'den Başak Aray.

Bunları mutlaka okumalısınız.

Unutmayın okudukça diliniz gelişecek ve bu şekilde daha iyi bir esperantist olacaksınız...

İyi okumalar...

Saluton,


En nia julia numero estas tre interesaj artikoloj, sed ni volas altiri vian atenton aparte al la tri jenaj artikoloj:

- 1) "La Fregato Ertugrul" de Egawa Harukumi el Japanio
- 2) "Krezo kaj Solono" de Spiros Sarafian el Grekujo
- 3) "Madono kun pelto-mantelo" de Başak Aray el Turkujo

Ilin vi nepre devas legi.

Ne forgesu, ke via lingvo pliboniĝos legante tekstojn kaj tiel vi fariĝos pli bona Esperantisto.

Bonan legadon...



TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com


Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Bona novaĵo el ILEI	2
Esperanto-Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leterojn ni ricevis el geamikoj	4
Printempa Amika Renkontiĝo en urbo Ruse,	4
La Fregato Ertugrul	5
Krezo kaj Solono	6
Madono kun pelto-mantelo	7
Universala menso en la jarcento de teĥniko	8
Kio ni estas kaj kion ni celas (6)	9
Kampanjo por informi pri Esperanto en la junulara festivalo Woodstock	10
Dankon Amiko (6) - de Claude Piron	11
Marjorie Boulton festis sian 93-a naskiĝtagon!	12
Plia Universitata Simpozio en Centra Eŭropo	13
Perseo-greka mito (2/3)	14
Plano por enkonduki Esperanton kiel ĝeneralan lingvon. Kiel tio povus aspekti?	16
Poemoj	17
Verda plastaĵo "serĉata"	18
Rezulto e voĉdono por elekti Kunordiganton de Afrika Komisiono de UEA	18
IJK 2017, kelkaj statistikoj	19
POLIGLOTA KUNVENO 2017	19
Mallonga Historio de Filozofio (17)	20
El la libro de "Dao de Jing" (12)	21
Gramatiko - Lingvaj Respondoj (6)	22
Gramatiko - Kiel akuzativigi fremdajn vortojn	22
Kuirarto - La pola bigoso	23
Ŝercoj	24
Kurĉvort-enigmo	24
8 kuriozaĵoj pri ridado kaj ĝiaj bonfaroj al sano	25
Esperanto Kurso (18)	26
Ni devas legi plimulte	27
La unua esperantista kosmonaŭto	28
Fermo	28

Kursoj



- 1) La kurso en la Lernejo Ŭskŭdar Amerikan Lisesi en Istanbulo daŭras.
- 2) La kurso por komencantoj en Kadiköy distrikto ne okazas ĉijare.
- 3) La kurso por komencantoj en Celal Bayar Universitato ne okazas ĉijare.

Bona novaĵo el ILEI !



Post longtempa strebado de aparta komisiono de Esperanto-Francio, la franca ministerio pri edukado ĵus oficiale sciigis tiun komisionon, ke eksperimenta instruado de nia komuna lingvo povos ekokazi, kie lernejoj bonvolos. Ankaŭ notinde estas, ke dum kvin jaroj okazos taksado de la atingitaj rezultoj – ĉefe ĉu numeraj gelemantoj kaj instruistoj montriĝos interesitaj lerni kaj instrui esperanton- la ministerio pripensos plivastigi enkondukon de tiu lingvo en la franca edukada sistemo.

Unuvorte, antaŭ konkreta rekono, ili devigas nin prui ke Esperanto estas allogpova, interesplena kaj ke ĝi utilis al la edukadaj sistemoj, i.a. al la franca, kompreneble.

Konsekvence, sukcesi ni devos, por ekestigi francan sed ankaŭ tutmondan esperanto-disvastigon.

Pro tio, al la komisiono evidentiĝas, ke la ideo rapide komuniki - antaŭ eventualaj renkontiĝoj- inter lernejoj el la tuta mondo grave ludos allogan rolon ŝlosilan je la okuloj de ambaŭ lernejestroj kaj lernantoj.

Tamen, nuntempe, la nura oficiala listo disponebla estas tiu de Edukado.net, kiu entute arigas kvin lernejojn (en Pollando; Belgio, Rumanio, Svislando, Brazilio) ; kvar kolegiojn (en Ĉinio, Brazilio, Rumanio, Svislando) kaj du liceojn (en Turkio, Brazilio). Ne estas multe kaj la komisiono havas la senton, ke tiu listo estas nekompleta; ĉu ?

Tiacele, estas lancita vastan alvokon por ke ĉiu instruanto kaj instruisto de nia komuna lingvo ĉirkaŭ la Mondo dece inskribiĝu en la retejo de Edukado.net.

Tia listo, speco de eta « Pasporta Servo » por lernejoj, ege helpus nin, se ni povus montri lernejiĉan rondon internacian.

Ju pli tion ni faros, des pli ni allogos novajn lernejestrojn kaj ni konvinkos la ĝeneralan publikon kaj landajn edukado-sistemojn prezenti al niaj junuloj nian karan komunikilon por la plejbono de la plimulto.

Ni kalkulas je la plej rapida partopreno de ĉiuj !

La plej kompleta listo estas che www.edukado.net "Kursejo" kaj ILEI uzas ĝin. Ne utilis krei aliloke novan liston. Konsekvence ni petas ke vi tien enskribu vian kurson !!

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



La 46-a Internacia Esperanto-Sumoo okazis inter la 7-a kaj 21-a de majo.

En ĉi tiu Sumoo

partoprenis 385 homoj el 31 landoj kaj 310 partoprenantoj venkis per 15 venkoj (80.5%). Kvanto de legitaj paĝoj estis pli ol 23,000. Averaĝe unu homo legis 60 paĝojn dum la 15 taga periodo.

Koreio okupis la unuan lokon kun 109 partoprenantoj, kaj Japanio falis en la dua kun 30 homoj malpli ol Koreio. Se Japanio kreskus, la nombro de partoprenantoj atingus 400.

Gratulon al Koreio! Tajvano grupe partoprenis kaj dediĉis sin al la rekorda nombro de la partoprenantoj.

Feliĉe partoprenis unu el Aŭstralio kaj unu el DR Kongo, tiel ni havis partoprenantojn el ĉiuj kontinentoj. Tamen la nombro de la partoprenantaj landoj ne multe kreskis. Partoprenis aŭstraliano, venezuelano kaj kazaĥo, sed male malaperis partoprenintoj el Argentino, Kolombio kaj Azelbajĝano.

El Turkujo partoprenis nur unu leganto tamen ke la potenco estas almenaŭ 5.

Sed en la fino, la nombro de la partoprenantoj, 385, estis rekorda.

Gratulu nin !

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl>

Nia facebook-grupo:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/>

Recenzoj pri libroj de la maja Sumoo

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/recenzomaj2017.html>

UEA



N-ro 681 (2017-04-29)

UEA havos novajn retpaĝon kaj administran sistemon

Post la retejoj www.esperanto.net, www.aktivulo.net, www.zamenhof.life kaj www.revuoesperanto.org la laboroj fokusiĝos al la novaj administra sistemo, membrospaco kaj al la retejo de UEA. [...]

<https://goo.gl/srTYpb>

N-ro 682 (2017-05-03)

La Estraro traktis renovigojn en Roterdamo

Nova membro-sistemo de UEA, kunlige kun nova datumbazo kaj nova retejo, estis unu el la paŝoj al modernigo traktitaj en la Estrara kunsido en Roterdamo, de la 21-a ĝis la 24-a de aprilo. [...]

<https://goo.gl/gtQhBQ>

N-ro 684 (2017-05-23)

UEA serĉas tradukistojn kaj provlegantojn por Unesko-Kuriero

Post kelkajara paŭzo pro financaj malfacilaĵoj, la fama revuo de Unesko reaperas kadre de interkonsento inter la ĉina registaro kaj la Organizo de UN pri Edukado, Scienco kaj Kulturo. [...]

<https://goo.gl/Za0oBP>

N-ro 683 (2017-05-12)

Internacia Kongresa Universitato kaj Sciencia programo en Seulo

Laŭ rekomendo de la IKU-komisiono, la Estraro de UEA decidis pri la prelegoj de la ĉi-jara sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU). [...]

<https://goo.gl/Bwxi08>

TEJO



La 74-a IJK – Internacia Junulara Kongreso de

TEJO okazos en Badajoz, Hispanio

La 74-a IJK – Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos en Badajoz, Hispanio, de la 4-a ĝis la 11-a de Aŭgusto 2018! [...]

<http://tejo.org/la-74-ijk-internacia-junulara-kongreso-de-tejo-okazos-en-badajoz-hispanio/>

Malferma alvoko: Iĝu TEJO volontulo en Burundo!

TEJO invitas vin por iĝi plentempa TEJO-volontulo en la Esperanto Centro en Rumonge, Burundo. Esti volontulo signifas ne nur grave kontribui al la bonfarto de la organizo, sed estas samtempe persona pliriĉiĝo. La volontulo povas kunlabori pri tre interesaj projektoj (ekz. organizado de aranĝoj, inform-agadoj, kampanioj aŭ evoluigo de interretaj projektoj), partopreni aranĝojn reprezentante TEJO-n [...]

<http://tejo.org/malferma- Alvoko-igu-tejo-volontulo-en-burundo/>

Kuraĝe kaj kore el Afriko

Ŝarifa Abas estas dudek-ses jara, loĝas kun siaj gepatroj. Nun ŝi ne laboras, sed ofte studas en sia libera tempo kaj helpas la movadon en Kenjo. Intervjuas Stela. Rakontu al mi pri la Esperanto-vivo en via lando, bonvole. Nun ni havas dek junulojn kiuj estas tre seriozaj pri Esperanto en Kenjo. Kvankam estas multaj aliaj [...]

<http://tejo.org/kurage-kaj-kore-el-afriko/>

Leterojn ni ricevis el geamikoj



Saluton estimata s-ro Kadifeli,
Koran dankon pro la regula sendado de via revuo "Turka Stelo". Ĝi estas ege interesa! Mi gratulas vin kaj deziras sukcesojn kaj novajn interesajn artikolojn kaj informojn pri la esperantista agado kaj ĝiaj aktivuloj en la tuta mondo. La revuo laŭ mi estas rĉenhava! Kiel instruistino kaj profesia filiologo min tre interesas la gramatikaj artikoloj. En la maja numero via artikolo "Pri la deveno de esperantaj radikoj" havas tre proksiman rilaton al la temo de nia esperanta konferenco pri la pureco kaj facileco de Esperanto, kiu okazis dum la Balkana Esperantista Renkontiĝo, kiun vi, bedaŭrinde ne povis viziti. Mi havas peton, ĉu vi ne kontraŭas sendi vian artikolon al ni rete, permesante aperigi ĝin en nia revueto "Esperantista tribuno" ? Mi sendas nian lastan numeron, tie vi povus informiĝi pri niaj aranĝoj dum la jaro 2016. Ni denove invitas vin al nia festo EKRA, kiu okazos inter la 19-an kaj 11-an de junio. Mi sendos al vi la programon.

Fratamikajn bondezirojn,

Dimitrinka Kateva- prezidanto de Esperantista domo pri kulturo en Razgrad, Bulgario



Estimata Vasil,
Unue, dankon pro la Turka Stelo. Mi ĵus malkovris ĝin kaj mi gratulas vian grupon pro la bontasko. Ankaŭ, mi petas al vi manieron por kontakti kun Amir Fekri, kiu verkis la artikolon "Du ranoj" en la lasta numero de la revuo.

Saluton el Hispanio,

Vincente manzano Arrondo



Salutojn revuo "Turka Stelo" kaj kara s-ro Vasil Kadifeli,
Unue prezentas min. Mia nomo estas Angel Ivanov Maglov kaj mi loĝas en vilaĝo Samovodene distrikto Veliko Tarnovo. Mia esperantista amikino el Finnlando sendis antaŭ kelkaj tagoj vian revuon "Turka Stelo". Grandega surprizo kaj tre amika donaco. Dankon! Mi devas skribi la veron, ke la revuo tre plaĉis min. Tre bone redaktita kaj kun multaj artikoloj. Por unua fojo mi aŭdis pri via revuo. Mi salutas vin s-ro Kadifeli por obstina laboro pri via revuo.

Angel Ivanov Maglov, Bulgario

Printempa Amika Renkontiĝo en urbo Ruse, Bulgarujo

Angel Maglov, Bulgarujo



Urbo Ruse estas belega kaj fama urbo situanta ĉe rivero Danubo. Danubo estas lima rivero inter Bulgarujo kaj Romanujo. La Esperanto societo "Libero" ekde longa tempo organizas en monato majo la renkontiĝon PARE

(Printempa Amika Renkontiĝo). Tiu-ĉi jaro la temo de la aranĝo estis "D-ro Zamenhof la Kreinto de ESPERANTO - 100 jarojn ekde lia morto".

Savova prezentis interesan kaj vastan artikolon pri la kreinto de Esperanto, kun multaj videoj kaj fotoj.

La muzika programo estis belega kaj krom esperantistoj partoprenis ankaŭ infanoj.

Vespere ĉiuj partoprenantoj vizitis la restoracion, kie ni kantis, dancis kaj amuziĝis.

La sekvanta tago ni ekskursis en nordorienta Bulgarujo kie ni vizitis famajn lokojn kunligitajn kun nia longa historio de nia patrolando - Bulgarujo.



En la renkontiĝo partoprenis multaj geesperantistoj el diversaj lokoj de Bulgarujo, inkluzive gastoj el Romanujo. La evento okazis en la urba biblioteko "Ljuben Karavelov". Unue ni aŭdis la himnon de Esperanto kaj poste la prezidantino s-ino Margarita



**Angel Ivanov Maglov
Vilaĝo Samovodene - Bulgarujo**



Saluton el la akcidenta loko de la osmana militŝipo “Ertugrul Firkateyni”

Mi nun loĝas en la gubernio Wakayama (Ŭakajama), meze de la ĉefa insulo en Japanio, en kies la plej suda pinto estas la urbeto Kuŝimoto.



La loko estas fame konata pro ne nur bela marbordo kaj fiŝado, sed la kuraĝa agado de la fiŝvilaĝanoj savi la turkajn soldatojn el la militŝipo Ertuĝrul Firkateyni frakasota de tajfuno (ventego) kaj mergiĝonta maren. Tio okazis en la noktomezo de la 16a de septembro, 1890, revenvoje de la ĉefurbo Tokio, kie la soldata delegitaro favoris per la aŭdienco de la japana imperiestro kaj amikiĝo kun japanoj dum tri monatoj.



Enfluinta marakvo en la militŝipon okazigis la eksplodon de la ĉefmaŝino, pro kio la subadmiralo kaj 587 soldatoj mortis. Nur 69 soldatoj savite postvivis, eble pro sendorma kaj senripoza savado, flegado por resanigo kaj elakvigo al la mortontoj fare de la ŝipvilaĝanoj, kiuj ĉiuj, tamen naivaj, ŝajnas alkuri malavare nur por savi ilian vivon kiel homo al homo trans nacieco. Post kuracado kaj ripozo en la havenurbo Kobe, 69 soldatoj estis akompanitaj per la du japanaj militŝipoj Hiei kaj Kongoo ĝis Istanbulo en la 2a de januaro, 1891. Tiam japanoj varbis la monhelpon por la familioj de la mortintaj soldatoj kaj sendis ĝin al Turkio.

En la pasinta jaro 2016, la filmo “La mara akcidento 1890” sub la kunlaboro de Japanio kaj Turkio estis publikigita. En Japanio multaj homoj apreziis kaj alte taksis ĝin. (<https://youtu.be/hUpwjZsfHrM>)



Apud la lumturo Kaŝinodaki, iama akcidenta loko, staras la pormerora monumento, kies la sama staras ankaŭ en la ĝemela urbo Mersin en Turkio kun

la urbeto Kuŝimoto. Mi aŭdas, ke en Mersin estas la strato nomata Kuŝimoto. Sub tia amika rialto, en ĉiu kvin jaro okazas la ceremonio apud la monumento por ripozigi animojn de la mortintoj de Ertuĝrul Firkateĝni kunlabore kun Japanio kaj Turkio. En mia gubernio Wakayama tio estas fame konata kaj preskaŭ ĉiuj homoj sentas amon al Turkio.



Kiam mi turismis kun mia edzino en Turkio antaŭ dek jaroj, ni ankaŭ spertis komplezon de turkaj civitanoj al ni japanoj, ĉu pro iama historia afero. Tio okazis en pramŝipo. Apude sidantaj patrino kaj ŝia filino alparolis nin, ĉu vi estas japanoj kaj memoras pri la “Ertuĝrul Firkateĝni”. Ni respondis, “Jes, ni loĝas en la gubernio, kie okazis la afero.” En amika rideto la patrino instigis al sia filino donaci turkajn kukojn al ni. Ni tre dankis elkore kaj ĝojis, pro ke iama bonafero ankoraŭ vivas kiel neforgesebla memoro transnacia. Kaj samtempe multaj japanoj neniam forgesos la bonaferon de Turkio, kiu helpis la fuĝon de 215 japanoj el Teherano senavare per turka aviadilo, okaze de la eksplodita milito inter Irano kaj Irako. En mia koro ankoraŭ nun restas karmemore via lando Turkio, situanta kiel ponto inter Eŭropo kaj Azio, kun kultura diverseco, historia profundeco kaj senafekta homeco akcepti ĉion.

verkis EGAWA Harukuni



Lidio estis iam la plej potenca regno de Malgrandazio. Tiu regno, en la daŭro de 140 jaroj (687-5467 a.K.), post senĉesaj atakoj, invadoj kaj militoj, konkeris kaj submetigis ĉiujn grandajn kaj malgrandajn najbarajn regnojn kaj iĝis la sola ege granda potenco de la tuta regiono.

Lidio atingis sian kulminon dum la reĝado (560-546 a.K.) de sia lasta reĝo, Krezo, kiu estis la plej riĉa homo de la tuta tiama mondo, tiel, ke lia nomo estas ĝis nun uzata kiel sinonimo de bilionulo.

En la tempo de Krezo la ĉefurbo de Lidio, Sardoj, estis la centro de la industrio, de la komerco kaj, sekve, ankaŭ loko loganta la mondon de la intelektuloj, artistoj, k.a. Krezo, persono progresema, simpatiis multe la homojn servantajn la spiriton kaj kulturon, tial li kutimis inviti kaj oferi la plej riĉan gastadon al eminentaj artistoj, filozofoj, saĝuloj k.s.

Unu el la plej distingindaj, mondkonataj tiamaj saĝuloj estis Solono el Ateno, kiu iam vizitis Sardojn. Eksciinte tion, Krezo tuj invitis la faman saĝulon en sia palaco kaj tre fiero pro sia riĉeco kaj feliĉo, montris al li ĉion vidindan kaj fine li kondukis la vizitanton al siaj palacoj kaj trezorejoj kie li montris sian nekalkuleblan riĉaĵaron.

Post tio, tute certa pri la respondo de la saĝulo, Krezo demandis lin, kiu laŭ lia opinio estas la plej feliĉa homo en la mondo.

La saĝulo senhezite respondis, ke la plej feliĉa homo kiun li konis estis iu Atenano, ordinara homo, laŭ la komuna opinio viro bonkondata, homama, tre bona kaj honesta civitano, kiu senlace laboris longe, kiu naskis sanajn kaj tre bonajn infanojn, kiuj siavice naskis tre bonajn geidojn. Tiu homo, militante kuraĝe por sia patrujo, falis heroe en batalo kaj la Atenanoj por honori lin zorgis pri lia enterigo, paginte pro tio el la publika kaŝo.

Krezo surprizite aŭskultis la strangan rakontadon de la saĝulo kaj petis de li diri, kiu post tiu Atenano estas laŭ li la plej feliĉa. Solono same facile diris al la indigninta reĝo ke estis du junaj fratoj, konataj atletoj el Argo, kiuj, iun tagon devis konduki sian patrinon kaj ties oferaĵojn, sufiĉe malproksimen, al sanktejo, por ke ŝi partoprenu la grandan solenan lokan feston, dediĉitan al la diino Hera. Tamen, ĉar la bovoj ne venis ĝustatempe de la agro, la junuloj senhezite junkis sin mem kaj kurante kiel eble plej rapide, tiradis la pezan ĉaron kaj atingis ĝustatempe la templon. Kompreneble la festantoj admiris la bravajn junulojn kaj beatadis la feliĉan patrinon, kiu preĝis al la diino kaj petis de ŝi

doni al ŝiaj filoj la plej bonan sorton. La junuloj, sanktoferis al la diino, ili sin amuzis kaj poste por ripozi kuŝis kaj dormis en la templo. La diino, bonaŭskultinte la preĝon de la patrino kaj ŝin favorante, oferis al la junuloj la morton en ilia plej brila, glora momento de ilia surtera vivo. La junuloj neniam vekigis kaj la Arganoj honoris ilin multe kaj memore al ilia braveco ili faris statuon kiun ili oferis al la granda tuthelena sanktejo de Delfoj.

Post tiu dua, laŭ li impertinenta kaj malrespekta, rakontado, Krezo, ege kolera, demandis la saĝulon kion li pensas pri li, kial li ne povas vidi lian evidentan, mondkonatan feliĉon. Solono respondis jene: "ĉio homa estas nefirma kaj necerta; vi, ja, posedas grandan riĉaĵaron kaj potencon, vi regas super multaj regnoj kaj popoloj, tamen mi ne povas scii ke same bone vi finos vian vivon. Sciu, ke neniu povas esti certa pri la feliĉo de homo, antaŭ ol vidi kia estas ties fino!"

Kompreneble la aroganta kaj fiero Krezo ne konvinkigis, kontraŭe, el la paroloj de Solono li konkludis ke la saĝeco de la fama saĝulo estas falsa.

Tamen, post kelkaj jaroj Krezo decidis militiri kontraŭ nova potenco de la teritorio, la regno de la Persoj, kiuj sub la regado de la reĝo Ciro iom-post-iome etendiĝis kaj plifortiĝis kaj post nelonge ŝajnis probabla minaco por Lidio. Sekvis kruela milito en kiu Krezo estis venkita kaj sklavigita, Lidio estis konkerita kaj detruita, la trezoroj de Krezo estis forrabitaj, ĉio estis perdita por la aroganta reĝo, kiu post nelonge estis ligita sur lignoamaso, kondamnita de Ciro al forbruligo.



La lastan momenton, kiam la unuaj flamoj ekaltiĝis, Krezo ekmemoris la parolojn de Solono kaj tiun fojon

kompreninte ilin bone, trifoje kriis la nomon de la saĝulo. Aŭdinte tion la persa reĝo, Ciro, deziris ekscii pri kio Krezo kriis. Li ordonis ke oni malligu lin kaj lin demandis. Li atente kaj respektive aŭskultis ĉion pri la vizito kaj la paroloj de la saĝulo, kaj, verŝajne pensante ankaŭ pri sia propra sorto kaj fino, donacis la vivon al la vere malfeliĉa Krezo.

verkis Spiros Sarafian, Grekujo



Dum mia lasta vojaĝo en Londono, mi ĝoje malkovris en la librovendejo



Waterstones amason da kopioj de la plej fama libro “Madono kun peltomantelo” de la turka verkisto Sabahattin Ali. Ekde sia angla traduko lasta jare, ĉi tiu libro estas nun inter la plej vendataj internaciaj noveloj. Ĝi estas laŭdata de literaturaj kritikistoj; tamen ĝia sukceso ne estas nova en sia hejmlando.




Naskiĝinta en 1907, Sabahattin Ali estis tre produktema verkisto. Li ne nur skribis tri romanojn, li verkis noveletojn kaj poemojn, kaj li ankaŭ estis kontribuanto kaj ĉefredaktoro en maldekstraj satiraj revuoj. Bedaŭrinde li suferis ŝtatajn persekutojn pro siaj bravaj politikaj kritikoj kaj sia proksimeco al la socialisma movado de Turkujo. Li estis detenita de sia laboro kiel instruisto kaj malliberigita multfoje, sed aparte konata estas lia suspekta murdo (1948) en la limo de Bulgarujo, kiam li provis kaŝe forlasi Turkujon por rifuĝi en alian landon. Lia morto estas atribuita al la sekretaj servoj de Turkujo, sed la aferon ankoraŭ hodiaŭ ne klariĝis.

La dumviva persekuto de Sabahattin Ali kaj sia tragika fino sendube estas inter la kaŭzoj de la simpatio siaj hodiaŭaj legantoj sentas por li. Tamen, lia romano “Madono kun peltomantelo” ne estas politika novelo. Malkiel “Kuyucaklı Yusuf” (Jusuf el Kujucak), alia ĉefa verko de Ali, ĝi ne estas skribita sub la inflo de socialisma realismo. Ĝi kontraŭe estas romantika amromano, parte influita de la vivo de sia aŭtoro. Ekde 1928 ĝis 1930, Ali loĝis en Germanio (kie la temo de la romano pasas) por studi kaj lerni la germanan. Poste li

revenis al Turkujo kaj laboris kiel germana instruisto kaj tradukisto. Malfruaj intervjuoj kun la familio kaj amikoj de Ali konfirmas la ĉeeston de membiografiaj partoj en la libro.

La novelo komencas en Ankara, kie la rakontanto amikiĝis kun sinjoro Raif, la mezaĝa tradukisto kiu laboras kun li. Raif estas tre introvertita homo, kaj ŝajnas tute ne posedi “spiriton”. La rakontanto estas kaptita per la mistero de ĉi tiu ŝajne tute ordinara homo, kiu evitas tutan homaran kontakton kaj neniam sciigas siajn emociojn. Iom post iom li malkovras la familian vivo de Raif, kiu estas malrespektata kaj malkomprenata eĉ de siaj plej proksimaj kontaktuloj. Kiam li forte malsaniĝas, li petas al la rakontanto ke li alportu siajn aĵojn, kiujn li forlasis en sia skribotablo en la oficejo. Inter ĉi tiuj aĵoj estas lia taglibro, per kiu Sabahattin Ali enkondukas siajn legantojn en la historio de Raif.

En la 30-aj jaroj, la patro de la juna Raif decidas sendi lin en Germanio por lerni sapo-fabrikadon. Raif estas introspekta, legema junulo. Fakte li estas pli interesita lerni la germanan kaj malkovri la mondan literaturon. Iam li lernas sufiĉe la germanan, li arde legas, kaj samtempe ĝojas promeni en Berlino. Krome, li ofte vizitas muzeojn kaj artoekspoziciojn. Dum sia vizito en unu moderna arto ekspozicio li estas frapita per la memportreto de Maria Puder. En la sekvantaj tagoj li revenas al la galerio por longe kontempli la pentraĵon. Finfine la pentristino komencas babili kun li, sed li ne rekonas ŝin tiam. Li senĉese pensas pri ŝi, sed nur la hazardo permesas ilin renkontiĝi denove. Tiam komencas nekonvencia amo inter ili. Laŭ la vortoj de Maria Puder – la madono kun peltomantelo en la memportreto – li estas kvazaŭ ina kaj obeema homo, kvankam ŝi estas sendependa kaj memfida virino.



Tamen ilia rilato finiĝos triste. Pli malbone, unu grava miskompreno detruos la fidon de Raif en la homaro. En malespero, li decidis vivi izolite, kaj amos neniun. Post legi la taglibron de Raif, la rakontanto estas impresita de la riĉa interna vivo de sia amiko, kontraste al lia tute modesta kaj neinteresa aspekto.

Malgraŭ la nuntempa remalkovrado kaj neesperita sukceso de la libro "Madono kun peltomantelo", la filino de Sabahattin Ali asertis ke sia patro neniam konsideris ĝin serioze. Liaj amikoj esprimis ilian surprizon pri tia romantika verko skribita per politika aktivisto tiel, kiel Sabahattin Ali. Nazım Hikmet, la komunisma poeto kaj proksima amiko de Sabahattin Ali, eĉ malkaŝe skribis al li sian seniluziigon, kaj rekomendis al li reverki la unuan parton de la libro por fari ĝin bona socialisma-realizma novelo. Li opinis ke la rakonto en la komenco estis de unu mezklasa burĝa familio el Ankara, kvankam poste ĝi estis malŝparita per banala romantismo.



peltomantelo" faris Zeyneb Abdi Golzar al la persa lingvo. Bedaŭrinde, por eviti cenzuron, la tradukistino devis ŝangi kelkajn frazojn en la libro, ekzemple ŝi estis ordonita forigi la verbon "kisi"!


verkis Başak Aray, Turkujo

La plej novan tradukon de la romano "Madono kun

Legu tradukitan parton de la romano ĉe:

<https://esperantoturkiye.wordpress.com/2017/05/21/madono-kun-pelto-mantelo-romano-de-sabahattin-ali/>

Universala menso en la jarcento de teĥniko



Dum vintra nokto en Alpoj, mi estis paŝanta en diktavola neĝo, kie mi enprofundiĝis ĝis meze la femuroj. Tre malvarmis. La blanka pulvoro knaris sub miaj plandumoj, ununura bruo en la silento. La spaco estis nigra kaj kristalpura, kaj la montoj bluaj sublune. Mi estis supreniranta certan

valeton de proksimume dudek minutoj kiam, transirinte irejon, mi trovis min antaŭ ligna barilo, kiu transgrimpendis.

Tuj kiam mi estis transpaŝegis la supran trabon, hazarde mia rigardo levigis al l'ĉiel'. Trans punto el iu

nuda branĉaĵo, la ronda luno iel ŝvebis inter la supraj branĉoj de iu lariko. Opinieble miliono da cirkonstancoj malklare celaranĝitaj atendis nur tiun lunon vortice de arbo por blindumi min. Dum unu sekundo eniris en mi pli da aferoj, ol iu ajn studado iam ajn akirigos, mi celas tiajn aferojn, kiuj kapablas plenigi animon, kaj kiujn racio poste esploras ĝis plendaŭra vivo. Ke tiu universo bonas. Ke bonas esti. Ke ĉiu penso disponas eternon antaŭ si. Ke ĉiu kaj ĉia amo estas sonĝo de l'motore de l'mondo strebanta je vekigo. Sed kion mi diras ? La parolo estas nur signo, ĝi povas transdoni nur vulgaran sperton. La unuopula konscio estas netransmetebla.

luj diros : vi ofertas lokon al malraciaĵoj. Sed racio estas konkerado. Sen io por konkeri, je kio ĝi do utilis? Kaj tio, kio ankoraŭ ne estas konkerita, kiel nomi ĝin?

Aimé Michel

el artikolo en revuo Planète n° 40, 1968
tradukis kaj sendis **Roland Platteau**

MILIONO!

da homoj lernas Esperanton en Duolingo

<p>Esperanto for English speakers</p> <p>871K Learners 8 Contributors</p>	<p>Esperanto for Spanish speakers</p> <p>130K Learners 7 Contributors</p>	<p>Esperanto for Portuguese speakers</p> <p>Phase 1 3 Contributors</p>
---	---	--

*Statistikoj de 20 majo 2017

Somera programo 2017 de Grésillon
<http://gresillon.org/spip.php?rubrique8&lang=eo>
Kulturdomo de Esperanto Kastelo Gresiljono

6. Lingva diverseco

MARK FETTES Lingvo-sociologo

La naciaj registaroj emas konsideri la grandan diversecon de lingvoj en la mondo kiel baron al komunikado kaj evoluigo. Por la Esperanto-komunumo, tamen, la lingva diverseco estas konstanta kaj nemalhavebla fonto de riĉeco. Sekve, ĉiu lingvo, kiel ĉiu vivajospicio, estas valora jam pro si mem kaj inda je protektado kaj subtenado.

Ni asertas ke la politiko de komunikado kaj evoluigo, se ĝi ne estas bazita sur respekto al kaj subteno de ĉiuj lingvoj, kondamnas al formorto la plimulton de la lingvoj de la mondo. Ni estas movado por lingva diverseco.

LASTATEMPE kreskas konscio pri la minacanta malapero de granda parto - de 90 ĝis 95% - de la ses ĝis sep mil lingvoj de la mondo. Ĉiujare aperas pli da libroj, sciencaj kaj ĵurnalistaj artikoloj, konferencoj kaj manifestoj pri tiu problemaro. La starpunktoj estas tamen tre diversaj, ĉu temas pri la kaŭzoj de lingvo-malapero, ĉu pri ĝiaj signifoj kaj konsekvencoj, ĉu pri la plej trafaj strategioj por lingvo-konservado.

Koncerne kaŭzojn, la Manifesto fingromontras al la naciosistemo nun reganta la mondan politikon. Laŭ la internacia juro, ŝtatoj estas preskaŭ plene decidrajtaj pri ĉio ene de siaj limoj. Precipe demandoj pri kultura kaj lingva identeco estas konsiderataj "enlanda" afero. Kaj kiel montris pluraj esploristoj pri lingvaj rajtoj kaj lingva diverseco (ekzemple Joshua Fishman, Tove Skuttnabb-Kangas kaj Robert Phillipson), la ondoj de modernaj ruliĝis el Okcidenta Eŭropo dum la 17-a, 18-a kaj 19-a jarcentoj kunportis unulingvismon kiel bazan principon de la moderna ŝtato. Eĉ tiuj ŝtatoj kiel Kanado, Svisio kaj Belgio, al kiuj la historio trudis du grandajn kaj potencajn lingvajn grupojn, tra la 20-a jarcento evoluis al ilia maksimuma disigo en unulingvajn erojn de federacia ŝtato.

La Manifesto mencias du ĉefajn motorojn de tiu unulingviga procezo. La unua, la komunika, datiĝas jam de la lastaj jaroj de la 15-a jarcento, kiam aperis la unua projekto de normigita nacia lingvo, la hispana. Laŭ Ivan Illich, tiu subita salto en la lingvo-teknologio estis reago al la disvastiĝo de la

presarto, kiu minacis disrompi la eklezian kaj reĝan monopolon super la skriba vorto. Ĉar elitoj ĉie kaj ĉiam celas certigi sian propran potencon, baldaŭ tra Eŭropo disvastiĝis normlingvoj bazitaj sur la parolmanieroj de la kleraj sociaj tavoloj. Tiun disvastiĝon definitive sigelis la apero de la moderna naciismo en la 18-a kaj 19-a jarcentoj - kolonia invento, laŭ Benedict Anderson, kiu baldaŭ trovis imitantojn en la eŭropaj hejmgregoj. Eble estas kritikinde, ke la Manifesto ne aludas al la ideologia flanko de la unulingvismo, ekzemple aldonante la vorton *unueco* al *komunikado*. Estas ja tute klare, ke alilingvanoj estas ofte konsiderataj ne nur kiel nekomprenemuloj, sed ankaŭ kiel potencialaj statperfiduloj.

La dua motoro, evoluigo, estas pli freŝdata invento. Laŭ Wolfgang Sachs kaj liaj kolegoj, la ideo ke ĉiuj ekonomiaj sistemoj devas "evolui" en la sama direkto, aperis nur fine de la dua mondmilito. Tamen, sub tiu vesto kaŝas sin unu el la ĉefaj principoj de la koloniismo: la ideo, ke la monda historio nature kulminis en la ekonomiaj kaj politikaj sistemoj de la industriaj landoj, kaj do aliaj landoj kaj socioj povas elekti nur inter eterna postrestado aŭ fidela asimilado de la samaj modeloj. Tiu ideo nun superregas la mondon en nekredebla grado: iusence ĉiuj landoj, eĉ Usono, iĝas ĝiaj kolonioj. Temas pri sistemo kiu ĉiam pli kaj pli favoras Egecon - kompaniegojn, ekonomiegojn, kaj ankaŭ lingvegojn. Estas tre dubinde, ĉu tia sistemo estas daŭripova, sed ĉi-momente, fine de la dudeka jarcento, ĝia influo estas ĉiea. Etajn firmaojn glutas pli grandaj, etaj ekonomioj sklaviĝas al la postuloj de la egaj, kaj indiĝenaj lingvetoj cedas al regionaj aŭ naciaj idiomoj.

La unikeco de Esperanto - kaj laŭ mi, la ĉefa kaŭzo de ĝia tre limigita disvastiĝo - kuŝas en tio, ke ĝi prezentas sisteman alternativon sur la lingva kampo. Multaj argumentis kaj daŭre argumentas por Esperanto, kvazaŭ ĝi estus simple speco de oleo por la radoj de la monda

moderna ŝtato estas unulingva

bazan principon de la moderna ŝtato. Eĉ tiuj ŝtatoj kiel Kanado,

Svisio kaj Belgio, al kiuj la historio

trudis du grandajn kaj potencajn lingvajn grupojn, tra la 20-a jarcento evoluis al ilia maksimuma disigo en unulingvajn erojn de federacia ŝtato.

normlingvo kiel rimedo de potenco

unua projekto de normigita nacia lingvo, la hispana. Laŭ Ivan Illich, tiu subita salto en la lingvo-teknologio estis reago al la disvastiĝo de la



“... La sola alternativo al amasa 'lingvocado' estas la disvastigo de ekologia rigardo en la kultura sfero, paralele al la biologia.”

komunika maŝino: ia "metra sistemo de la lingvoj". Sed metroj kaj gramoj ŝanĝis nenion en la fizika mondo; ili simple plisimpligis la kalkulojn. Esperanto, aliflanke, kapablas ŝanĝi sintenojn, potencrilatojn, eĉ nian koncepton de la fenomeno "lingvo". Kaj ĝuste tiaj subjektivaj faktoroj subtenas la socian ordon - ĉian socian ordon. Se la tuta mondo, aŭ ĝia granda parto, aliĝus al la "Esperanto-komunumo", la du aŭ tri menciitaj motoroj de unulingvigo simple ĉesus funkcii, ĉar la homoj ne plu kredus je ili. Eble la novaj kredoj estus egale mitaj, sed ili tutcerte spegulus la plurlingvan realon de la mondo, al kiu Esperanto estas adaptita. La unulingvigaj mitoj radikas en la ŝtatkonstrua epoko, kaj subtenas lingvosistemon kaj lingvistikon artikitajn per naciaj normlingvoj. Esperanto, kontraste, subtenas lingvosistemon kaj lingvistikon, kie centras la interindividua komunikado: "ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj" kiel Zamenhof trafe formulis tion en Bulonjo.

"La interna ideo de Esperanto, kiu havas absolute nenan devigon por ĉiu esperantisto aparta, sed kiu, kiel vi scias, plene regas kaj ĉiam devas regi en la Esperantaj kongresoj, estas: sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton."

L.L. Zamenhof en
la Krakova UK, 1912

praktikaj iloj de negocado kaj transcendaĵoj de identeco. Ne eblas kredinde prognozi la sorton de ĉiuj lingvoj, se Esperanto disvastiĝus tutmonde: ĉu, ekzemple, la buŝaj tradicioj ne plu malaperadus cede al la skribaj? La Manifesto tamen pravus en sia kerna aserto. Granda parto de la riĉeco de Esperanto devenas de la denaskaj kaj naciaj lingvoj de ĝiaj parolantoj, kaj de la variaj kulturoj esprimataj en tiuj lingvoj. La parolantoj de Esperanto, kiel elokvente

La Manifesto asertas, ke en tia lingvosistemo ĉiuj lingvoj nepre taksigis valoraj kaj "indaj je protektado kaj subtenado". Nu, tio estas eble unu el la novaj mitoj, kiujn Esperanto naskas por anstataŭigi la naciajn. Lingvoj estas ŝanĝiĝemaj kaj ĉiam kontestataj aferoj, intime interplektitaj kun emocioj kaj ideologioj, samtempe

argumentis Auld kaj Daŝgupto, ĉerpas ne el iu "internacia" kulturo senigita de lokaj koloroj kaj odoroj, sed el la buntaj renkontoj de ĉiu loka kulturo kun la Alia - la reala aŭ imagita gasto sub kies rigardo oni ordigas kaj elmontras sian hejmon. Tia gastamo (kaj gasta ĝentileco) kernas en la Esperanta lingvosistemo. Naciaj lingvoj, male, estas nek bonaj gastoj nek bonaj gastigantoj: hejme, ili aspiras al muzeeca ordo, kvazaŭ tro zorgaj kuratoroj; malhejme, ili batas la tablon, postulante ke ĉio estu "kiel ĉe ni".

*ni ĉiuj estas gastoj
sur la tero*

Gastado kernas en ĉiu ajn ekologia rigardo al la mondo. Tial ne surprizas la Manifesta komparo inter lingvoj kaj vivaĵospecioj, ĉar Esperanto enkorpiĝas sintenon nur lastatempe disvastigitan de la ekologia movado: la ideon, ke ni ĉiuj estas gastoj sur la tero, etike devigataj pludoni ĝin kiel eble plej bonfarta al niaj posteuloj. Mi forte suspektas, ke la sola alternativo al amasa "lingvocido" (pli-malpli intenca senlingvigado de la mondo) estas la disvastigo de ekologia rigardo en la kultura sfero, paralele al la biologia. Kaj tio montras, kiel defia kaj ĉiam pli urĝa estas la tasko kiun ni transprenas kune kun tiu ĉi "simpla" lingvo.



Kion fari, por doni konkretan sekvon al la konstatoj de la Manifesto? Unue, klerigi nin mem pri la lingvoj ĉirkaŭ ni: pri la ecoj, luktoj kaj sortoj de la multaj indiĝenaj kaj enmigrintaj lingvoj en nia propra ŝtato. Due, serĉi kontaktpunktojn inter tiuj lingvoj kaj Esperanto: ĉian tradukon, ĉian broŝuron aŭ artikolon, eble seminarion aŭ eĉ lingvokurson. Trie, verki etnolingve pri la ekologiaj ecoj de Esperanto - ne krude, laŭ la devizo "Esperanto aŭ nenio", sed kunkpense, montrante la paralelojn kaj invitante pluan dialogon kaj kunlaboron. Kvare, esplori la eblojn de konstantaj rilatoj inter E-organizaĵoj kaj asocioj por minacataj aŭ minoritataj lingvoj. Kvinde, subteni la agadon de IKEL (Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj) aŭ de aliaj E-organizaĵoj aktivaj sur la kampo de minoritataj kaj lingvaj rajtoj. Sese... sed mi ne forprenu de vi la plezuron de propraj elpenaĵoj kaj malkovroj!


(daŭrigota)

Kampanjo por informi pri Esperanto en la junulara festivalo Woodstock



Helpu nin kolekti €4,000 por realigi Esperantan agadon en aŭgusto 2017, dum la junulara festivalo Woodstock. Ĉiu donaco al tiu ĉi evento estas duobligata de UEA, ĝis la sumo de €2,000, tiel ke organizantoj ricevas entute la sumon de

€4,000. Vi povas sendi vian donacon al UEA konto "Informado", aldonante kiel celon: "por Woodstock". Woodstock estas mondfama kultura festivalo, kie partoprenos pli ol 600 000 junuloj inter la 3-a kaj 5-a de aŭgusto 2017. Filmeton kaj pliajn informojn vi trovos ĉe **www.gazetaro.org/woodstock**



8

Estis la unua nokte. En sia gardista uniformo, Rikardo sentis sin stranga, kvazaŭ li teatrus, kaj kvazaŭ, pro nekomprenebla kialo, li akceptis rolon, kiu tute ne taŭgas al li.

Verdire, kiam li decidis proponi sin al Sekuriks —

ĉar li ne plu eltenis la kunan insiston de Milan kaj Katarina — li estis certa, ke tiu firmao malakceptos lin. Lia tro juna aĝo, lia timema aspekto, lia videbla manko de praktikaj kapabloj ebligis tuj konstati — li opiniis — ke li ne taŭgas por tia alt-respondeca okupo.

Sed tiel ne estis. La oficisto apenaŭ rigardis lin. Sekuriks bezonis gardistojn, gardisto prezentiĝis, homo juna, sana, sufiĉe alta, normale forta, kion pli vi dezirus? Krome, letero de eksgardisto, kiu ĉiam laboris plej kontentige, varme priskribis la bonajn ecojn de ĉi tiu novulo. Ni proponas tian pagon, vi faros tion kaj tion ĉi, ĉu vi povas komenci jam ĉi-nokte? Nu bone, perfekte, mankis al ni unu gardisto kaj necesus devigi aliajn longigi siajn laborhorojn, kion ili ne ŝatas, nek ni, cetere, ĉar ni tiam devas pagi pli... La afero estis rapide aranĝita. Antaŭ ol li havis la tempon konsciiĝi, kio okazas, Rikardo retrovis sin kun uniformo kaj precizaj indikaĵoj pri tio, kion li faru ĉi-nokte.

Fakte, la laboro ne estis vere malplaĉa. Malŝlosi pordojn, reŝlosi ilin, promeni sur stratoj senhomaj sub la amika rigardo de patrineca luno, reeniri domon, signi sian pason ĉe la tiucela surmura aparato, nenio el ĉio ĉi estis terura. Eble Katarina kaj Milan pravis. Eble tiu laboro estis la plej bona maniero pagi al si reveturon hejmen, aŭ eĉ — kiu scias? — pluan ferian restadon en alia ankoraŭ nekonata lando, kien Katarina akceptus sekvi lin. Rikardo komendis konsideri la vivon kun pli trankvila filozofio.

Li rigardis la paperon, kiu enhavis la sinsekvon de liaj taskoj. “Nun al Plinov.” li legis. Plinov estis ĉiovendejo, grandega milfaka magazeno, kie eblas aĉeti ion ajn. Rikardo devis pasi laŭ difinita vojiro sur ĉiu etaĝo kaj en diversaj lokoj marki sian ĉeeston per la horskriba aparato.

Estis precizigite al li, ke la kontrolon li devas fari en mallumo, kun nur poŝlampo, por tuj povi vidi fajron komenciĝantan. Estis strange trapasi tiujn vastajn etaĝojn nokte, en mallumo, sen renkonti iun ajn, dum tage homoj ĉi tie multegas.

Alvenante sur la kvinan etaĝon, la junulo aŭdis bruon, kiu ne aperis tute normala. Li mallumigis sian poŝlampon kaj staris senmova, provante kompreni, pri kio temas. Jes, li ne misaŭdis, ne estis ludo de lia imago, sed reala bruo, kaj super la loko, el kie la sono venis, videblis malforta lumo: tie iu uzis poŝlampon.

Rikardo sentis sian koron bati kun nekutima forto. Plej silente li proksimiĝis, singarde, malrapide, por ne riski konigi sian venon per fuŝa ektaŭso al io nevidebla. Li vidis la ombron de homo, kiu faris lon en plej kaŝa, ŝtela maniero. Li ektimis.

Same senbrue, kiel li venis, li paŝis reen kaj iris al la suba etaĝo, kie li povis neĝenate telefoni. Li ja sciis, ke Milan kaj Katarina troviĝas en proksima restoracio-dancejo. Por kuraĝigi lin, antaŭ lia timplena foriro al la nokta laboro, ili diris al li, ke ili estos tie, meze de la urboparto, kiun li devas prizorgi, kaj tie restos malfrue post noktomezo.

“Milan? Dank’al Dio vi ankoraŭ ĉeestas!”

“Kio okazas? Vi sonas, kvazaŭ vi ĵus ekvidis la diablon.”

“Aŭskultu, Milan, vi devas helpi min. Mi timas. Mi estas en Plinov. Kiam mi alvenis al la kvina etaĝo, mi aŭdis nenormalan bruon. Poste, mi proksimiĝis kaj vidis... Mi vidis nur ombron, sed ne povas esti dubo. Estas homo tie, kiu kaŝe faras ion. Eble li ŝtelas, eble... Kiel mi povus scii? Helpu min, Milan, kion mi faru?”

“Arestu lin. Certe, se li laboras en senhoma magazeno ĉe tia lumo, li faras ion, kion li ne rajtas fari. Se li estus tie rajte, Sekuriks antaŭinformus vin. Iru lin aresti!”

“Aresti! Mi, aresti homon! Kiel oni faras? Mi neniam kapablas.”

“Rikardo, ne infanu, vi estas viro aŭ kio? Estas plej simple. Paŝu, unue senbrue, ĝis plej proksime al li, kaj poste rapide antaŭen kun la lumo de via poŝlampo al li direktita tiamaniere, ke ĝi igu lin senvida. Tiam vi diru per aŭtoritata voĉo: Kion vi faras ĉi tie? Mi arestas vin.”

“Sed se li havas armilon, eble li mortigos min!”

“Ĉu Sekuriks ne donis al vi precizigojn, kiel agi en tia okazo?”

“Jes, sed tiu ulo parolis tiel rapide kaj vortigis al mi tiom da detaloj pri tiom da aferoj samtempe, ke mi ne kapablas memori. Fakte, mi ne vere aŭskultis. Min timigis la fakto, ke, kontraŭ mia atendo, ili akceptas min.”

“Ĉu vi mem ne havas armilon?”

“Jes, ili donis al mi. Sed mi ne scias, kiel uzi ĝin, kaj, se mi bone memoras, mi praktike ne rajtas ĝin

utiligi. Eble eĉ estas nenio en ĝi, mi ne rigardis. Tiuj aferoj timigas min.”

“Nu, elprenu vian armilon. Tenu ĝin dekstramane. Alproksimiĝu kiel mi diris. Kaj kiam vi estos tute proksime, direktu la poŝlampan lumon al liaj okuloj dirante: mi estas armita, vi ne povas elsavi vin, miaj kunuloj vin observas...”

“Kunuloj! Ĉu vi akceptas veni min helpi?”

“Ne, ne, tio ne estas necesa. Diru tion nur por timigi lin. Li ne povas scii, ĉu vi diras la veron aŭ ne, sed eĉ se li iom dubos, li ne riskos sian vivon pro ebla misideo. Kuraĝon, Rikardo, mi estas certa, ke vian devon vi bonege faros.”

“Klik” aŭdigis la telefona aparato: Milan ne lasis al Rikardo la tempon respondi.

Reirante supren, la juna gardisto esperis, ke la kaŝaganto estos for. Fakte, tiu estis foriranta: poŝlampe ete lumigis vojon, kiun ombro sekvis singarde. Li celis la lokon, kie staris Rikardo, por malsupreniri laŭ tiu sama ŝtuparo, kiun la knabo ĵus uzis. Malvarma pro timo, la knabo kapablis fari neniun movon. Li nur staris tie, kun buŝo malfermita, koro batanta, kaj pensoj disflugantaj en nearanĝebla malordo.

Tamen finfine unu ideo sukcesis eltiri sin klara super la pensa senordo: “Mi devas lumigi la poŝlampon kaj direkti ĝin al liaj okuloj.”

Ve! Antaŭ ol Rikardo faris la necesan moveton, lin trafis la lumo de la alia poŝlampulo, kiu tuj diris per voĉo plena je danĝera aŭtoritato:

“Kiu vi estas? Kion vi faras ĉi tie?”

Nur tiam Rikardo lumigis sian lampon. La alia surhavis la saman uniformon kiel li! Sekuriks-ulo!

“Mi arestas vin!” tiu diris. Li estis iom malpli alta ol Rikardo kaj korpe ne pli forta, sed li havis tian naturan aŭtoritaton, ke nia amiko tute certe ne povus superforti lin. La ideo lin albatu, aŭ simple diri ion, eĉ ne trapasis la kapon rikardan.

“Levu la manojn!” la alia diris. Kaj dum Rikardo, kiel fileto faranta, kion la patro diris, eĉ ne pridubante ties pravecon, altigis sian man-paron, la ulo rapidmove prenis la armilon de la knabo.

“Malsupren!” Li plu diris, signante per la armilo, ke ĉia rifuzo havus danĝerajn sekvojn.

Ŝafide, Rikardo lasis la uniformulon konduki lin al la subtera parto de la konstruaĵo.

“Nun mi vokos la policon,” la ulo diris kun stranga, supereca rideto. “Ilin interesos ekscii, kion vi, kiel malvera gardisto, planis fari ĉi tie.”

La ulo eliris kaj ŝlisis la pordon. Sola, la knabo sentis fortan emon plori, sed apenaŭ malsekiĝis liaj okuloj. Ial, neniu ploro venis.

(daŭrigota)

Marjorie Boulton festis sian 93-an naskiĝtagon !



Estis denove granda plezuro reviziti Marjorie Boulton, unu el la plej konataj esperantistoj. Ŝi ĵus festis sian 93-an naskiĝtagon. Plaĉis al mi vidi ŝin en sufiĉe bona stato kaj en bona humoro. "Mi faras bone, laŭ mia aĝo", ŝi volonte konfirmas. Nuntempe ŝi ne plu povas bone marŝi senhelpe, do rulseĝo necesas. Bonŝance

kunloĝas kun ŝi Maciej, ŝia prizorganto, kiuj de kelkaj jaroj bonkore kaj ege atente zorgas pri ŝi. Marjorie nomas lin 'mia nobla polo'. Tio ja li estas.

en universitataj kunvenoj, muzikaj eventoj, ja ŝi eĉ ĉeestis la 100-an Universalan Kongreson en Francio.

Plaĉas al Marjorie viziti la faman botanikan ĝardenon en Oksfordo. Same kiel rigardi al la antaŭfronta ĝardeneto de ŝia (kompreneble) verda domo, kie ĉiam estas provizita manĝaĵo por katoj de la najbararo, kaj akvo por la birdetoj.

Interparolado kun Marjorie nuntage estas iom pli malrapida ol antaŭe, sed ankoraŭ ĝi estas piprita per inteligentaj frandaĵoj kaj bona humoro. Sed lastatempe mankis bona apetito al ŝi. Pri tio ŝi mem iom miras.

Nu, ni deziras, ke ŝi ankoraŭ sufiĉe bone ĝuu siajn venontajn krepuskajn jarojn.

Fonto:

<http://oxfordesperanto.blogspot.co.uk/2017/05/marjorie-boulton-festis-sian-93.html>

Pro li ŝi povas forlasi la domon kaj ankoraŭ partopreni

Plia Universitata Simpozio en Centra Eŭropo

Dulingva altnivela simpozio okazis en la 19a de majo 2017 en la Universitato de Vroclavo en okcidenta Pollando. La progamo daŭris kvin horojn kun dekkvino da kontribuantoj, laŭplane la duono esperantistoj kaj la duono polaj profesoroj. Sekve, multo bezonis sinsekvantan tradukadon, komence al la tempuzado, la posttagmezo tamen ebligis al pluraj polaj profesoroj aŭdi Esperanton, kaj konstati, ke ĝi estas parolebla kaj funkcias. La universitata revuo anticipe aperigis artikolon pri Esperanto kaj la simpozio kaj poste aperigos duan artikolon pri la realigo.



Sur la foto: Prelegas Lidia Liĝeza kaj prezidas Reinhard Fössmeier

En la malferma ceremonio bonvenigon donis la rektoro de la Vroclava Universitato, prof. dr. hab Adam Jezierski. Sekvis salutoj de du honoraj patronoj de la simpozio: por Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) prof. Reinhard Fössmeier laŭtlegis saluton de Amri Wandel, la prezidanto de AIS, kiu menciis la ĵusan statuson de Vroclavo kiel Eŭropa Urbo de la Kulturo. Por UEA salutis ĝia vic-prezidanto, kiu menciis du lastatempajn simpoziojn en la regiono, en Poznano (PL) kaj en Timișoara (RO). Li bonvenigis la ĵusan decidon de EU doni al ukrainanoj servizan aliron al la Unio – kio malfermas la vojon al pli kontentigaj kontaktoj inter la universitato de Luyck kaj aliaj en Eŭropo.

La esperantistaj referantoj estis Malgorzata J. Komarnicka (Mallonga historio de Esperanto kun etleciono), Stefan MacGill (Rolo de denaskaj esperantistoj), Lidia Liĝeza (Poezio kaj literaturo en Esperanto), kaj Reinhard Fössmeier (Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino – organizo kies celo estas mildigi la rolon de lingva diskriminacio en la scienca komunikado). Ĉiu ricevis po 20 minutojn, inkluzive kelkkaze de la traduktempo.

Pli frue en la 18a kaj 19a de majo okazis la 34a seminario pri Aktivula Maturigo (AMO). La temoj inkluzivis prezentaĵojn pri la baldaŭ finiĝanta Jaro de la Lernanto, kaj pri la temo de denaskismo inter esperantistoj kompare kun aliaj lingvoj. Prepara teksto disiris kun EKO 12. Kvankam neniu alia partoprenanto estis denaska esperantisto, multaj havis spertojn pri du-lingvaj familioj, aŭ vivado en lando, kie oni ne naskiĝis kaj la neformala karaktero de la seminario permesis aŭdi multajn rilatajn spertojn.

Post paŭzo sekvis pollingvaj prezentaĵoj: Prof. Adam Jezierski (Ekumena Vroclavo), Prof. Jan Miodek (La pola de la jaroj 1918-2018), Prof. Piotr Oszczanowski (Arto en Vroclavo), Prof. Janusz Degler (Muzeo de Teatro en Vroclavo), Dr hab. Joanna Subel (Muziko en Vroclavo). La tago finiĝis per resumo de la simpozio, plenumita de Barbara Despines, dr hab. Universite Paris 1 Pantheon-Sorbonne (Francio).

En postaj tagoj sekvas kantkonkurso, en kiu partoprenos 130 personoj, diversaĝaj: infanoj, junuloj kaj personoj el la ora generacio, kielsolkantistoj kaj korusoj. La ĵurianoj juĝo nur la kantojn prezentitajn en Esperanto.

Stefan MacGill

Vicprezidanto de UEA

Fotoj el koncerto de la germana kantisto Kaŝi, kun improvize aldonita artisto, Jomo el Francio. La du fotoj (de SMG) ne estis faritaj sammomente, do Jomo sukcesas aperi kaj sceneje kaj en la ap,laŭdantaro.



Perseo - greka mito (2/3)



En soleca roka regiono staris malpura kabano. Tie loĝis tri maljunulinoj, fratinoj de la gorgonoj. Jam de malproksime Perseo aŭdis ilin kvereli. Ili havis kune nur unu denton kaj unu okulon. Neniam ili povis interkonsentiĝi, kiu el ili ĝuste rajtas preni la okulon kaj la denton. Apenaŭ iu de la maljunulinoj prenis la okulon kaj rigardis ĉirkaŭ si, jam dua volis preni ĝin kaj ankaŭ volis rigardi. Sed tuj, kiam ŝi prenis la okulon, jam la tria forprenis ĝin de ŝi. Kaj pri la dento ili kverelis simile.

"Kiu iras tie?" vokis la maljunulinoj. Ili aŭdis la paŝojn de Perseo, sed ne vidis lin, ĉar ili ĝuste luktis pri la okulo kaj neniu povis havigi ĝin al si.

"Kiu ajn vi estas", kriis la unua, "venu pli proksimen kaj estu nia juĝisto!" "Estu nia arbitraciisto, por ke ricevu mi la okulon!" vokis la dua. "Ne fidu al ŝi", kriĉe kriis la tria, mi nun estas en la vico. Al mi nun apartenu la okulo!"

Perseo prenis la okulon kaj la denton kaj diris: "Kial mi ne estu via arbitraciisto? Mi prenos la okulon kaj la denton kaj la kverelo estos finita."

La maljunulinoj komencis lamenti, ili palpatis per la manoj kaj volis kapti Perseon. Sed sen la okulo ili estis blindaj kaj kaptis nur vakan aeron. Kiam ili rimarkis, ke ili ne kaptos Perseon, ili komencis peti: "Redonu al ni la okulon. Ni plenumos deziron al vi, se vi redonos la okulon kaj la denton."

"Diru al mi", parolis Perseo, "kiel mi venu al la nimfoj, kiuj konservas la flugilitajn ŝuojn, la sorĉosakon kaj la kaskon, kiu senvidebligas. Tuj kiam mi scios tion, mi redonos al vi la okulon kaj la denton."

"Deziru ion alian", provis konvinki lin la maljunulinoj. Sed Perseo ne volis scii ion pri tio, li ne cedis. La maljunulinoj ekhavis timon, ke Perseo povus foriri kun la okulo kaj la dento. Kun veaj lamentoj ili perfidis al li la vojon al la nimfoj.

Perseo redonis la okulon kaj la denton al ili kaj forlasis la tristan regionon sur tiu vojo, kiun la maljunulinoj montris al li. Ju pli li malproksimiĝis de la maljunulinoj, des pli bela fariĝis la regiono. Unue montriĝis nur tie kaj tie herbeja loketo, sed baldaŭ etendiĝis al ĉiuj flankoj verdaj herbejoj. La solecaj kriplaj arboj estis sekvatataj de belegaj odorantaj boskoj kaj en la plej granda bosko plena de odorantaj kaj florantaj arbustoj dancis sur senarbejo nudapiedaj nimfoj. Perseo petis ilin pri la ŝuoj, la sako kaj la kasko, kaj la bonaj nimfoj volonte alportis ĉion al li.

Perseo ligis la flugilitajn ŝuojn al siaj piedoj, surmetis la kaskon, kiu senvidebligas kaj ĵete pendigis la sorĉosakon surŝultren. Poste li depuŝiĝis de la tero kaj leviĝis en la aeron. Ĉiu el liaj paŝoj estis kiel flugilbato kaj portis lin rapide antaŭen. Nenio malhelpis lin dum la flugo. Li migris super la arbokronoj kaj montopintoj. La odorantaj boskoj kaj freŝaj herbejoj ekmalaperis kaj Perseo denove flugis super trista regiono. Morne leviĝis en ĝi malgrandaj kaj grandaj rokoblokoj kun strangaj formoj. Kelkaj similis bestojn, aliaj homojn. Ĉiuj ĉi roko-blokoj iam estis vivantaj estaĵoj. La rigardo de la gorgonoj transformis ilin en ŝtonojn. Ankaŭ misvojaj birdoj falis teren antaŭ la gorgonoj kaj rigidiĝis transformitaj en nigrajn ŝtonopecojn.

Perseo deturniĝis de la malĝojiga ŝtonpejzaĝo kaj rigardis sur sian radiantan ŝildon. En ĝi li vidis la saman malĝojigan bildon kaj post certa tempo aperis ankaŭ la gorgonoj. Ili dormis ĉe la rando de spegule glata lago. La teruraj kapoj de la gorgonoj kun hararaj tufoj el serpentoj anstataŭ hararo disvastigis eĉ dum la dormo teruron.

"Ne hezitu", parolis mallaŭte kaj kuraĝige la diino Atena al li, "la meza el la gorgonoj estas Meduzo."

Perseo flugis malsupren al la dormantaj monstroj. La serpentoj sur iliaj kapoj sibilis. Ili flaris la enpenetrinton.

Perseo rigardis en la spegulon de sia ŝildo kaj celis Meduzon. Li levis la akran serpon kaj detranĉis la kapon de Meduzo per unu tranĉo. El la gorĝo de Meduzo saltis la flugilita ĉevalo Pegazo, ĝi batis per la flugiloj kaj la vosto kaj malaperis antaŭ la suprizita

Perseo en la nuboj.

Nun Perseo devis forporti la kapon de Meduzo. La kapo estis tiel granda, ke Perseo dubis, ĉu ĝi trovos lokon en la sako, eĉ kvankam ĝi estis sako sorĉa. Sed la sako akceptis la ŝarĝon kvazaŭ ĝi estus ŝtoneto el siliko kaj ĝi restis tiom malpeza, kvazaŭ ĝi estus plu malplena. Perseo leviĝis helpe de siaj flugilŝuoj en la aeron kaj forflugis.

La susurado vekis la du aliajn senmortemajn gorgonojn. Ili rigardis supren kaj ekvidis la mortan fratinton kaj ekkoleriĝis. Ili disetendis siajn drakoflugilojn, cirkulis super la lago kaj serĉis la kulpinton. La serpentoj sur iliaj kapoj baraktiĝis kaj kliniĝis minace. Sed por Perseo ili restis nedanĝeraj. Li estis nevidebla, ĉar li surhavis la kaŝigan kaskon. Vane la koleraj gorgonoj rastis la aeron. Perseo fuĝis de ili.

Li flugis kaj jam ĝojis, kiel li surprizos la patrinojn kaj la reĝon. Per siaj flugilitaj ŝuoj li baldaŭ estos hejme. Subite leviĝis ŝtormvento, ekkaptis la flugantan Perseon kaj forportis lin en mala direkto. Perseo batalis kontraŭ la vento, sed tiu estis pli forta ol li. Ĝi blovis lin ĝis Afriko.

La lacigita Perseo sidiĝis sur herbejon. Liaj okuloj brulis de la vento, kaj la tuta korpo doloris. Volonte li ripozus.

"Kion vi faras ĉi tie?" eksonis super li tondra voĉo. Ĉe la arbara rando staris la potenca giganto Atlaso kaj liaj piedoj fosiĝis profunde en la teron.

"Lasu min ĉi tie", petis la lacigita Perseo, "mi volas iom ripozi kaj poste flugi plu."

"Do, iru tien, de kie vi venis", kriis Atlaso. Misfideme li observis Perseon. "Eble vi celas la orajn pomojn, kiu

sci? Rapide foriĝu!"

Perseo koleriĝis kaj vokis: "Tia kara gastamikeco meritas donacon!" Li turniĝis flanken kaj tiris el la sako kapon de Meduzo.

Apenaŭ ekvidis Atlaso la teruran kapon de Meduzo, li transformiĝis en rokan monton. Liaj barbo kaj hararo kroĉiĝis al la montaj deklivoj kiel arbaroj kaj vepro. La monto kreskis pli kaj pli alten ĝis lia kresto tuŝis la ĉielon. Ankoraŭ hodiaŭ en Afriko troviĝas montaro, kiu havas la nomon Atlaso.

Perseo kaŝis la kapon de Meduzo en la sako, sternis sin sur la herbejo kaj ekdormis. Li dormis la profundan dormon de la herooj ĝis la radiantaj briloj de la suno de l' varmega Afriko vekis lin. Apenaŭ spireto de aero moviĝis kaj Perseo esperis revidi ankoraŭ je la sama tago sian patrinojn. Li daŭrigis sian aervojaĝon. Dum li flugis super la lando, gutis el la kapo de Meduzo sangaj gutoj, penetris tra la sako kaj falis teren. Apenaŭ ili tuŝis la teron, ili ŝanĝiĝis en venenajn serpentojn. De tiam en Afriko vivas tiom da danĝeraj serpentoj.

Li jam flugis longan distancon, kiam li vidis sub si amason da homoj. Ĉiuj forkuris de la mara bordo, kvazaŭ ili fuĝus de tertremo. Perseo ŝvebis malsupren, miksiĝis en la hastantan amason de homoj kaj demandis kial kaj kien ili kuras.

"Malfeliĉo trafis nian landon", konfidis la plagataj homoj al Perseo. "Nia reĝino Kasiopejo fanfaronis esti pli bela ol ĉiuj nimfoj de la maro. La kolerigita dio Pozidono punis la tutan regnon pro tio. Ĉiutage elgrimpas de la maro terura monstro. Ĝi neniigas niajn gregojn kaj voras homojn. Hodiaŭ oni oferu la reĝinan filinon Andromedo. Oni jam kondukis ŝin al roko ĉe la bordo. Ni akompanis ŝin, sed nun ni forkuras por ne devi rigardi ŝian pereon. La monstro estas tuj aperonta el la maro."

Aŭdante tion, Perseo kuris al la bordo kaj leviĝis super la maron.

(daŭrigota)

Tiun ĉi grekan miton prilaboris kaj produktis Vladimir Türk kaj Jarka Malá el Ĉeĥio. Vi povas aŭskulti tiun ĉi artikolon en la jena ligilo:

Fonto:

<http://esperantaretradio.blogspot.gr/2017/04/perseo-23-greka-mito.html?view=classic>



SOMERAS
de la 21-a ĝis la 28-a de Aŭgusto 2017
en la kastelo Grésillon (Francio)

internacia semajno:
* popoldancoj
* pupteatro
* ekskursoj...

por plenkreskuloj kaj infanoj
gvidantoj el Svedio,
Pollando, Germanio...
ek de 8€ tage

gresillon.org/s4


Affuga de Londono por malpli ol 50€

Plano por enkonduki Esperanton kiel ĝeneralan lingvon. Kiel tio povus aspekti?

Ekde la okdekaj jaroj mi havas la impreson, ke la plej bona vojo por la enkonduko de Esperanto estas organika kreskado: Pli kaj pli da homoj informiĝas pri Esperanto, kelkaj lernas Esperanton (pli ol forlasas la komunumon), la komunumo kreskas, la avantaĝoj fariĝas pli kaj pli grandaj ktp.

Kontraste aliaj homoj pledas por ĝenerala enkonduko de Esperanto, per politika decido. Mia demando estas, kiel tio detale funkcii. Ĉu ie ekzistas plano pri tio? - Mi revenas al la temo iom sube, sed unue enŝovas du grafikojn pri la evoluo de Esperantujo tra la jardekoj.

Kiel oni povas bone vidi en diversaj lokoj, la daŭra kreskado estas la fakta evoluo de Esperantujo. (Kelkaj homoj dubas pri tio dirante, ke estas malpli da lokaj grupanoj - sed ja estas pli da retaj grupanoj.) Jen ni vidas ekzemple la kreskon de la landaj asocioj de UEA.



Jen estas la entuta nombro de aktivaj intenciaj Esperanto-asocioj (nur ĝis 1984, fina jaro de la enketo)




FIGURE 5.1. Foundings and density of Esperanto INGOs, 1905-1984. Density is the number of organizations active in each year.

Pliaj statistikoj montras la nombron de Esperanto-libroj (kresko unue, poste stabileco) ktp.

Sed mi revenu al la temo de **plano por la ĝenerala enkonduko de Esperanto kiel ĝenerala lingvo en ĉiuj landoj**.

Ĉu ie jam ekzistas tia plano?

Jaro 1: La registaroj de ĉiuj aŭ tre multaj landoj principe interkonsentas, ke ili volas enkonduki Esperanton. Necesas do realigi planon por tio. Ekzemple kaj iom krude:

Jaro 1 ĝis 5: Oni al lernejoj instruistoj instruas Esperanton kaj post tio didaktikon de Esperanto.

Ekde jaro 5: La instruistoj komencas instrui Esperanton, ekzemple al dekjaruloj.

Jaro 6: En Eŭropa Unio (500 milionoj da loĝantoj) estas eble unu miliono da dekjaruloj, kiuj nun estas ekinstruitaj. Eble ĉiu havis tri instruhorojn semajne, do en la jaro eble 100 horoj. Baza nivelo. Tiu miliono da Esperanto-lernantoj devas nun praktiki la lingvon por plulerni. Kiel aranĝi tion? Ĉu la kelkaj cent mil aktivaj Esperanto-parolantoj sufiĉos por konversacii kun ili?

Jaro 7 kaj postaj: Ĉiujare alvenas ondo de plia miliono da Esperanto-lernantoj... Kiel zorgi pri ili, pri ilia uzado de Esperanto, ilia plulernado?

Aliflanke mi demandas min, kion diros la gepatroj. La registaroj volas instrui lingvon kun tiom malmultaj parolantoj - kaj flankenlasi en la unua fazo la lingvojn kun cent milionoj aŭ pli da parolantoj. Oni volas instrui lingvon, en kiu aperas jare centoj da libroj kaj volas flankenlasi lingvojn kun kvindek miloj aŭ ducent miloj da novaj libroj jare. Ĉu la gepatroj estos entuziasmaj? Ĉu la infanoj? Ĉu la infanoj poste estos kontentaj kun tio?

(Mi ne vere miras, kiam homoj kontraŭstaras tian enkondukon de Esperanto...)

Mi havas la impreson, ke tiuj, kiuj pledas por la ĝenerala enkonduko de Esperanto, eble prezentu planon aŭ almenaŭ skizon aŭ ideojn, kiel tia enkonduko de Esperanto funkcii en la praktiko. Sed eble tio ekzistas jam delonge. Ĉu?

Lu Wunsch-Rolshoven

Poemoj



KIEL MI FARTAS

Al demand' pri farto, mi respondas jene:
"Dankon, tre bone, malgraŭ iom ĝene".

Krom la atretismo, pulso nenormala,
Kolesterolriĉa sango, spir' fatala,
Alta sangopremo kaj astmo sezone,
Do rilate aĝon, mi fartas tre bone.
Sen baston' moviĝi mi jam ne scipovas,
Kvankam plej facilan vojon mi retrovas.
Pro sendormec' nokte mi tre turmentiĝas,
Denove bonfartas, kiam mateniĝas.
Kapturton mi havas, malbonan memoron,
Sed bone mi fartas havante fervoron.
El versaĵo mia la senco elfluas,
Se maljunec' venas kaj malfort' – do pravas
Tio, ke konsenti kun la osto-knaro
Vi jam devas nepre, kiel kun najbaro.
Kun ĉi sort' vin ligu, dentojn premegante,
Per plend' pri malsano ne enuigante.
La oldec' (kutime l' ora aĝ' nomata)
Post enlitiĝ' mia estas malbenata...
En skatol' "oreloj", "dentoj" en la glaso,
"Okuloj" sur tablo, kia embaraso!
Antaŭ endormiĝo min afliktas tio...
Ĉu el demetendaj partoj jam nun ĉio?
Dum junaĝ' facile vetkurojn mi faris,
Kaŭrogimnastikojn. Nenio min baris...
En mezaĝo tiom da fortoj mi trovis,
Ke multfoje noktojn tutajn dancscipovis,
Nun tempoj ŝanĝiĝis, maljuneco venas,
Al vendej' promene, hejmen mi jam svenas.
Por oldul' l' konsilo: Silente vi sidu,
Premegu la dentojn kaj je vivo ridu.
Post vekiĝ' kolektu ĉiujn "partojn" viajn,
En presaj' tralegu nekrologojn ĉiajn,
Pro mank' de l' nom' via en ĝi – la konstato:
Ke vi bone fartas malgraŭ la sanstato.

Verkis: Józefa Jucha

Esperantigis: **Edward Jaśkiewicz**



Sub la ombro de pomarbo

Sub la ombro de pomarbo
sidas belulino ĉarma,
ŝajnas ke ŝi skribas ion,
sur ia tago-libro blanka.

Kvankam, mi senzorga estas
kun diskreto ŝin rigardas,
ĉar la rava belulino

mian ĉeeston ja kaptas.

Pli kaj pli mi distanciĝas,
sed kun la menso pli klara
pri perfekteco de l'homo
kies belecon mi flaras.

Ŝajnas ke mi aŭdis ion,
sed mi tute ne kuraĝas
pro timo turni la kapon

INCITNUDIĜO

Malmulte erotika,
la senvestiĝ' publika
en noktoklubo kela
ŝajnigas sin sencela.

Sesfoje ĉiunokte
knabinoj per provok' de
incitnudiĝ' paradas,
lascivon nur fasadas,

pensante dum formeto
de l' ŝtrumpoj kun rideto,
pri l' prezoj kiuj soras,
ĉu piedkal' doloras;

libidas senlibide,
la koksojn svingas fride
(rikanas kun reflekso
pri l' stulta vira sekso).

La klientar' enuas,
aŭ memkonscie bruas
(triumfas kaj prestiĝas
ĉar ino sendigniĝas).

Ne estas ja sencele:
ĉi kruda lud' kruise
simbolas sentsufokan
malamon recipokan,

kiu tra ĉiu bosko
tempestar sen agnosko

**William
Auld**



Fonto:

<http://gxirafoblogspot.com.tr/2017/04/william-auld-striptease-incitnudigo.html>

Dia konekto

La blua majosuno
la sekreton ne malkaŝas
de l'arboj ĉe plac', kiuj
ĉirkaŭbrake interparolas
per silento amema.

Sed elmontras scienco
pulsadon de l' radikoj
per reto tre mirinda:
la "interreto natura",
kiu l'arbojn konektas.

Maria Nazaré Laroca

<http://nazarelaroca.blogspot.com.tr/>

Efemero

L' aprila suno orflave
ekridetis sur mia korpo,
kiu malkonsentas nun
kun la pasintaj revoj.

Doloroj strekas la pezon
de l' tempo sur la ostoj;
kaj mi pli lante paŝas
malgraŭ l'arboj, kiuj ade
parolas pri floroj kaj birdetoj.

La tempo ne pasas en la placo:
estinto kaj estonto ĉiam nunas.
Estas nur mi, kiu pasas.

Maria Nazaré Laroca



"Verda plastajo" serĉata



De vestaĵoj ĝis elektronikaĵoj: Plastaĵoj hodiaŭ troveblas ĉie. Ankaŭ tie kien ili ne apartenas, nome en la

maro. De apenaŭ 100 jaroj plastaĵoj post uzo estas forĵetataj - nun oni esploras pri novaj materialoj kiuj estos pli medikonvenaj.

Plastaĵoj depost la dua mondmilito elstaras pro nekredebla historio de sukceso. En la jaro 1950 la tutmonda jara produktado de artefaritaj plastaĵoj ankoraŭ sumiĝis al unu miliono da tunoj. Hodiaŭ post sep jardekoj, la jara produktado situas ĉe 300 milionoj da tunoj - kun plialtiĝanta tendenco. Plastaĵproduktoj hodiaŭ troviĝas ĉie, de la forĵetota plasta saketo ĝis la elektronika kerna konsistero de komputo.

Ke mondo sen plastaĵoj hodiaŭ ne plu estas imagebla, tio havas simplan kaŭzon. La nivelo de produktivo de modernaj plastaĵoj ne plu estas superebla per aliaj materialoj.

Dum komence plastaĵoj estis aplikataj por produkti luksaĵojn malpli koste, depost la dua mondmilito la plastaĵoj fariĝis materialoj por amasa produktado. Jam tiam produktoj el plasta materialo estis forĵetataj post uzado. Ĝis la 1960-aj jaroj tiu vivostilo kun forĵetataĵoj estis konsiderata ideala por la estonteco.

Artefaritaj plastaĵoj posedas en preskaŭ ĉiuj kampoj, en kiuj ili estas aplikataj, ne nur la pli bonajn materialajn ecojn, sed ili estas ankaŭ produkteblaj je

pli favoraj kostoj. Multaj plastaj produktoj estas dezajnitaj tiel ke ili post mallonga uzado alvenas en la rubaĵujo. La klasika ekzemplo estas unufoj-uzata plasta saketo. Ĝi uziĝas averaĝe dum 25 minutoj antaŭ ol ĝi ĵetiĝas en la rubaĵujon. En la Eŭropa Unio en la jaro 2011 ĉiu homo ĉiujare uzis proksimume 200 plastajn saketojn.

La esplorado pri polimeroj hodiaŭ koncentriĝas ne nur pri daŭripovaj kaj energiefikaj materialoj. Se artefaritaj plastaĵoj fariĝu daŭripova materialo, la kvoto de reciklado devas pliboniĝi. La industria plastrubaĵo jam hodiaŭ estas relative bone reciklebla, ĉar ĝi aperas nemiksita laŭ specoj. Sed tie kie plastaĵoj estas forĵetitaj kaj miksitaj aŭ malpurigitaj, tie la reciklado kaŭzas problemojn. Tiaj produktoj preskaŭ ĉiam devas esti forbruligitaj.

Estus ideale se eblus apliki la principon de la cirkulado de karbonhidratoj en la naturo ankaŭ al la reciklado de plastaĵoj. Karbondioksido estas ligata per la fotosintezo en plantoj kaj estas re-enaerigata pro bakteriaj malkonstruaj procezoj. Ili simila estus dezirinda ankaŭ por plastaĵoj kiuj same baziĝas sur karbonhidratoj.

Mikroorganismoj kiuj povas disigi plastaĵojn al siaj konsisteroj, estas jam esplorataj. Per tiel nomataj biopolimeroj, do plastaĵoj el rekreskantaj krudmaterialoj, povus ekesti tiel nova cirkula ekonomio. Tio kontribuos al ŝrumpado de la ekologia postlasaĵo de plastaj produktoj - almenaŭ se ili estos forĵetataj laŭ ĝusta maniero.

Fonto:

<http://esperantaretradio.blogspot.com.tr/2017/05/verda-plastajo-sercata.html?view=flipcard>

En la supra ligilo vi ankaŭ povas alskulti la artikolon.

Rezulto de voĉodono por elekti Kunordiganton de Afrika Komisiono de UEA



En la 13-a de majo, 2017 nova Afrika Komisiono estis konsistigita el 10 personoj fare de UEA. Kaj sekvis voĉodono por elekti la Kunordiganton de Afrika Komisiono, kion mi mem

prizorgis. Hieraŭ la limdato por voĉodono finiĝis, tial hodiaŭ mi anoncas la rezulton de la voĉodono de la 9 komisionanoj (s-ro Doumignon Koffi el Togolando ne voĉdonis).

Jen rezulto,

Kunordiganto : S-ro Emile Malanda el Sudafriko (gajnis 6 voĉojn)

Vickunordiganto : S-ro Francois Hounsounou el Benino (gajnis 2 voĉojn)

Mi esperas, ke sub la gvido de nova Kunordiganto afrika movado pli kaj plu progresos. Pli detalaj laborotaskoj ni diskutos baldaŭ. Ni kune klopodu por Verdigi Afrikon.

LEE Jungkee

Estrarano de UEA pri Afrika Movado

IJK 2017: kelkaj statistikoj

La plej prestiĝa renkontiĝo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), nome la 73-a Internacia Junulara Kongreso de Esperanto okazos en Aného, Togolando, de la 5-a ĝis la 12 de aŭgusto 2017. Estos la unuafoje kiam la jar-renkontiĝo de TEJO okazos en la kontinento.

Fakte, ĉi-jare la iama deziro de junaj togolandaj aktivuloj gastigi la jar-eventon de TEJO realiĝos. Antaŭ ĉ. 10 jaroj, la togolanda junulara sekcio oficiale kaj formale kandidatiĝis pri la organizo en 2009 de la 65-a IJK, kiu fine okazis en Liberec kunlabore inter Ĉeĥio, Germanio kaj Slovakio.

Kvankam la unua afrika IJK multflanke specialas, ĝi funkcios per kutime konataj programeroj en Esperantujo: Dum la tago okazos programo rilata al temo de la kongreso - Virinoj kaj viroj kun siaj kulturoj - movadaj kaj distraj programeroj. Okazos krome aktivaĵoj de la projekto-AEJK (Afrik-Eŭropa Junulara Kapablo, komentis Łukasz Żebrowski, eks-prezidanto de TEJO. Laŭ li: Kiel dum la IJK okazos kunsidoj de la Komitato de TEJO kaj aliaj programeroj rilataj al la vivo de la asocio. Certe ne mankos ankaŭ distraĵoj, sportaj programeroj, manlaboroj, ekskursoj kaj diversaj kursetoj dum kiuj spertuloj dividos siajn konojn kaj sciojn kun partoprenantoj. Dum la vesperoj okazos kultura programo, ekzemple, koncertoj kaj teatraĵoj. Ili ebligos konatiĝi kaj kun la kulturo de Esperantujo kaj kun loka arta tradicio.

Malgraŭ tio ke la decido pri la okazigo de la IJK en Togolando estis tre malfrue anoncita, 66 personoj sur 3 kontinentoj el 20 landoj jam aliĝis al la renkontiĝo. Eble la nombro de la ĉi-jaraj IJK-anoj estos malpli ol 100 personoj,

tamen oni esperas havi pli grandan eventon ol tiujn, kiuj okazis 1962 en Ystad (Svedio) kaj 2013 en Nazareto (Israelo) respektive kun 70 kaj 90 aliĝintoj. Krome plejverŝajne la 73-a IJK ankoraŭ altiros pli da aliĝemaj landoj ol kelkaj el la jam okazintaj IJK.

Certe estos la ŝanco, por togolandanoj aparte kaj por samkontinentanoj ĝenerale, sperti relative multnombro tiun etoson de la tutmonda junulara organizo tra ĝia jar-renkontiĝo, la IJK! Kunvenos junaj E-aktivuloj de la tuta mondo, do ne mankos programeroj per kiuj ili povos interŝanĝi spertojn, trejniĝi, prezenti sian agadon, tiel esprimis sin togolanda aktivulo, entuziasme.

La listo de la aliĝintaj landoj ĝis la 15-a de majo konsistas el: TG (11), BJ (11), SK (9), NG (5), FR (4), BI (4), DE (4), NL (3), IT (3), PL (2), GH (1), ZM (1), KE (1), RU (1), CA (1), BE (1), SN (1), ES (1), MZ (1), FI (1).

Eblas aliĝi al la ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso per la kongresa retpaĝo:

<http://ijk2017.tejo.org/aligilo>

ADJE Adjevi



POLIGLOTA KUNVENO 2017

POLIGLOTA = PLURLINGVULA KUNVENO kun E@I = 450 HOMOJ!



Plurlingvula / Poliglota kunveno PG-2017, organizita de E@I sukcese finiĝis en Bratislavo! La kunvenon ĉeestis 458 partoprenantoj el 52 landoj...

Plurlingveco? Jes ja, eĉ pri ĝi sci-povas tre bone zorgi E-istoj! Ekzemple organizante tutmonde la plej grandan renkontiĝon de plurlingvemuloj!

Gvidantoj de E@I, Peter Baláž kaj Dorota Rodzianko tre dankas al ĉiuj volontuloj, organizantoj kaj ĉiuj aliaj, kiuj kontribuis al profesie kaj agrable realigita evento!

PLI da informoj pri la evento: <http://www.polyglotbratislava.com/eo/>

Gratulon al E@I !!

Szilvási László



Saluton,
En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun la filozofoj Voltaire kaj Leibniz

Vasil Kadifeli



David Hume

La imaga horloĝisto David Hume

Rigardu al niaj okuloj, kiel iliaj irisoj adaptiĝas al la lumo, kiel ili turniĝas dekstren kaj maldekstren, ili havas palpebrojn kaj harojn en iliaj randoj. Ĉu ili ne estas mirindaj faraĵoj de iu

inĝeniero? Ĉu ili povas esti ŝance evoluiĝintaj? Kiam en dezerta insulo vi trovas detruitan palaco vi scias, ke ĝin oni, iam konstruis. Kiam vi hazarde trovas sur la vojo brakhorloĝon vi estas certa, ke oni desegnis kaj konstruis ĝin. Ili ne povas esti hazarde evoluiĝintaj, iu devas esti pripensinta, desegninta kaj konstruinta ilin. Kaj rigardu ĉion alian en la naturo, birdoj, arboj, bestoj, homoj ktp. Ili ŝajnas esti desegnitaj kaj konstruitaj, ĉar ili estas eĉ pli komplikaj ol horloĝoj. Tiu desegninto devas esti iu tre inteligenta arĥitekto aŭ iu sankta horloĝfaristo. Tiu devas esti Dio kaj eĉ en nia tempo multaj homoj ankoraŭ pensas tiel. Tiun argumenton oni nomas la “Argumento pri Desegnado”.

Dum la 17-aj kaj 18-aj jaroj la inventitaj mikroskopoj kaj teleskopoj kaj ĉio nove observita per ili apogis tiun pensadon. Sed la skota filozofo David Hume (1711-76) ne estis tiom konvinkita. Hume sub la efekto de John Locke (vidu Turka Stelo #17) pensis pri kiel ni akiras niajn konojn, cerbumis pri niaj penslimoj, kaj provis malkovri la naturon de homoj kaj iliajn lokon en la universo. Li kiel Locke kredis, ke niaj konoj estas la rezulto de nia observado kaj spertado. En sia libro “Pri homa kompreno” (1748) li diris, ke per tia rezonado ni ne povas montri, ke Dio ja ekzistas. En tiu tempo paroli kontraŭ la kredo je Dio estis malfacila afero kaj pro tio David Hume neniam fariĝis profesoro en iu ajn universitato. En sia verko “Dialogoj sur natura religio” (1779) li severe atakis la konatajn argumentojn pri la ekzisto de Dio, do tiu libro estis eldonita nur tri jarojn post lia morto.

montras, ke malantaŭ ĉio devas esti ia ĉiopova, bona, estaĵo kiu konas kaj kapablas fari ĉion. Tiaj argumentoj nur diras: “tio ŝajnas esti desegnita, do devas...” kaj pro tio ili nur helpas al nia religia kredo sed ili ne povas esti uzataj por pruvi ion. Li pensis tiel: pensu pri pesilo kies unu brako estas malantaŭ kurteno kaj ni ne povas vidi ĝin. Se ni observas ke la brako, kiun ni vidas, leviĝas tiam ni povas diri, ke en la alia brako estas “io” peza, sed ni ne povas diri ion pri kio kaj kia ĝi estas, ĝia koloro, ĝia aspekto, ĝia formo ktp. Ĉio alia kion vi dirus pri tiu objekto estus nur konjektoj. Do, se ni pensas, ke io ŝajnas esti desegnita, tio estas nur tio, kion ni povas diri pri tiu objekto, ni nenion alian povas diri pri kiu desegnis ĝin kaj kia tiu degnanto estas. Plue ni kredas, ke Dio scias ĉion, kapablas je ĉio kaj estas absolute bona. Do, tiam, kial ekzistas okulmalsanoj? Kial niaj okuloj dum jaroj perdas siajn kapablojn vidi bone? Ĉu ili estas desegnitaj tiel? Eble, sed tion ni certe ne povas diri rigardante al niaj okuloj. Eble estas pli ol unu dioj kaj niajn okulojn desegnis iu malsupera dio, ka pro tio okazas tiaj malsanoj. Eble ilin desegnis iu maljuna Dio kiu jam mortis, aŭ eble Dio ankoraŭ estas juna kaj provas lerni kiel desegni okulojn.

Hume atakis ankaŭ la kredojn pri la diversaj mirindaĵoj en religoj. Mortintoj reviviĝas, homoj piediras sur akvo, statuoj parolas aŭ ploras, ktp. Ĉu nur pro tio, ke aliaj kredas ilin, ni ankaŭ devas akcepti, ke ili estas veraj? Por ke io estu mirindaĵo ĝi devas kontraŭi iun naturan regulon, kaj tiuj reguloj diras ke neniu reviviĝas post morto, neniu povas piediri sur akvo, statuoj neniam parolas aŭ ploras. Tiuj reguloj estas certaj, do kiam oni diras, ke li vidis ion, kio kontraŭas ilin, kial ni kredu lin?

Hume neniam diris, ke li estis ateisto kaj eble li ne estis. En ĉio li verkis, li diris, ke rigardante la okulojn, al ni ŝajnas, ke ili estas desegnitaj per ia sankta inteligentulo, sed ni ne povas diri ion pli pri tiu inteligentulo. Ni ne povas diri ion pri la kvalitoj de tiu desegnanto kiun oni nomas “Dio”. En 1776 kiam li kuŝis en mortolito, li diris al siaj amikoj, ke li neniam revenos al religio. Kiam lia amiko James Bowell kiu estis forta kredanto, demandis lin ĉu li timas aŭ ne pri kio estas kaj okazos post la morto, li respondis ke li estis certa ke nenio ekzistas post morto. Lia respondo estis simila al tiu de Epikuro (vidu Turka Stelo #6): Ĉar li ne zorgas pri kio estis antaŭ sia naskiĝo, li ankaŭ ne zorgas pri la posta parto de sia morto.

Li kredis, ke la “Argumento pri Desegnado” ne

(daŭrigota)

EL UNUA PARTO - TAŬO

23



Faru rara la vortojn,
tiukaze ĉio iros per si mem.
Kirloŝtormo daŭras eĉ ne dum tuta mateno.
Torenta pluvoverŝo eĉ ne tagon.
Kaj kiu efektivigas ilin?
Ĉielo kaj Tero.
Do, tion, kion eĉ Ĉielo kaj Tero ne kapablas
daŭrigi,
kiel kapablu tion, eĉ malpli, la homo?

Tial: Se vi iras al via laboro, iru kun TAŬO,
tiel vi identiĝos kun tiuj, kiuj havas TAŬO-n, rilate
al TAŬO,
kun tiuj, kiuj havas VIVON, vi identiĝos rilate
VIVON.
kun tiuj, kiuj estas povraj, vi identiĝos rilate la
povrecon.
Se vi identiĝas kun ili rilate TAŬO-n,
tiukaze tiuj, kiuj havas TAŬO-n,
ĝoje iros renkonte al vi.
Se vi identiĝas kun ili rilate VIVON,
tiukaze tiuj, kiuj havas VIVON,
ĝoje iros renkonte al vi.
Se vi identiĝas kun ili rilate ties povrecon,
tiukaze tiuj, kiuj estas povraj, ĝoje iros renkonte
al vi.
Sed tie, kie la kredo ne estas sufiĉe forta,
oni ne trovas kredon.

Rimarkoj de Anniespera

Wang Bi laŭ Vilhelmo diris: „La saĝulo povas elteni ĉion kaj
identiĝi kun ĉio - do ankaŭ kun la perdo, la povreco.“

Rimarkoj de Chongfang

"En tiu ĉi ĉapitro Laŭzi pritraktas la principon de sia Taŭo kaj
la manieron ĝin posedi. Se oni kredas je ĝi, oni ĝin akiras.
Se ne, oni ĝin perdas. Li ankaŭ emfazas la gravecon de fido,
kiam li finas tiun ĉi ĉapitron, dirante: „Nur kiam la reganto ne
havas sufiĉan fidecon, la popolo lin ne fidus.“

"Laŭ Laŭzi la kaŭzo, kial la ventego ne daŭras unu tutan
matenon, estas atribuita al la leĝoj de la Ĉielo kaj la Tero,
t.e. al la leĝoj de la naturo. Per tio li montras al ni, ke la
homo devas sekvi en siaj kondukmanieroj la leĝojn de la
naturo, ĉar, se la naturaj fenomenoj estas ŝuldataj al la leĝoj
de la naturo, kiel do la homo ne devus ilin sekvi? Se eĉ la
forto de la Ĉielo kaj la Tero ne povas longe daŭri, kiel do

povus longe daŭri la homa forto kaj eĉ la honoro, famo,
rango, profito ktp? Kaj kiel do estas necese, ke oni energie
ĉasu honoron, famon kaj profiton kontraŭ sia konscienco?."

24

Tiu, kiu staras sur la piedfingroj,
ne staras firme.
Tiu, kiu iras per disetenditaj gamboj,
ne sukcesas antaŭeniĝi.
Kiu mem volas brili,
ne estas lumigata.
Kiu mem volas esti grava,
ne fariĝas grandioza.
Kiu mem laŭdas sin,
ne plenumas verkojn.
Kiu mem elstarigas sin,
ne estas levata.
Li estas por TAŬO kiel kuireja rubo aŭ
pusoŝvelaĵo.
Kaj ankaŭ la estaĵoj ĉiuj malamas lin.
Tial: Kiu havas TAŬO-n,
ne restadas ĉe tio.

Rimarkoj de Cezar

Pensante dialektike, oni ĉeokaze devas retiriĝi por
antaŭeniĝi. Tion mi ofte spertis en mia vivo, ekzemple kiel
kulturfunkciulo en pasinta vivo en la tielnomata GDR; tiu, kiu
staras tro longe en la lumo de publika vivo, kutime, sed ne
devige, perdas sin mem, ofte kreas nenion plu, fariĝas
burokrato, vanta ventfarulo, fine nur ombro de sia propra
potencialo, aŭ eĉ pli draste dirate, kvazaŭ kuireja rubo aŭ
pusotubero. Interese estas, ke B.Traven en sia romano "La
Mortula Ŝipo" nomas la kapitalismon: "pesttubero de la
homaro." Fortaj influoj fare de Laocio ankaŭ en aliaj verkoj
de B.Traven konstateblas, kaj en la verko entute
ekkoneblas. Certe tio estas sekvo de la traduko de Rikardo
Vilhelmo, kiun tiu publikis unufoje en la jaro 1911, kaj kiu
poste estis tradukita ankaŭ en multajn aliajn lingvojn.

Ankaŭ en Esperantio mi faris la sperton, ke propra elstarigo
neniam kondukas al elstareco, sed tute male al malŝatateco.
La ŝafgregoj ne ŝatas la nigran ŝafon kaj la konsciaj
individuoj ne ŝatas la „viron de la amaso“, kiel Edgar Poe
nomis tiajn ulojn.

(daŭrigota)

Pri la sufikso «ar»

Vi diras, ke la sufikson «ar» ni devas uzi nur por esprimi aron da tiaj objektoj, kiuj estas esence ligitaj inter si kaj prezentas ian unuecon, kolektivitan objekton (ekzemple «vortaro», «arbaro», «homaro»); sed por ia nombro da samspecaj objektoj, kiuj ne estas esence ligitaj inter si kaj ne prezentas kune ian unu ideon, vi konsilas uzi la esprimon «aron da» (ekzemple: «li ellernis aron da vortoj», «tie kuŝis aro da dehakitaj arboj» k.t.p.). Vian opinion mi trovas ĝusta. — Pri la dua senco de la vorto «aro» (mezuro) volu kompari mian respondon n° 24.

Respondo 33, La Revuo, 1908, Majo

Pri la sufikso «eg»

Tute prave vi diras, ke la sufikso «eg» ne povas servi por simpla anstataŭado de la vortoj «granda» aŭ «tre», sed ĝi devas servi por kreado de vortoj novaj kun senco speciala. Tia ne-ĝusta uzado de la sufikso certe ne estas aprobinda, kaj, kiom oni povas, oni devas ĝin eviti. Tamen esti tro severaj en ĉi tiu rilato ni ankaŭ ne devas. En multaj okazoj, en kiuj ni povus bone uzi la vortojn «granda» aŭ «tre», ni povas ankaŭ sen peko kontraŭ la spirito de Esperanto uzi la sufikson «eg», ĉar tre ofte la saman ideon unu persono povas prezenti al si kiel ideon simplan en granda mezuro, dum alia persono ĝin prezentas al si kiel ideon specialan. Ekzemple, la vorton «bonega» ni preskaŭ ĉiam povus anstataŭigi per «tre bona», kaj

Kiel akuzativigi fremdajn vortojn

Estis diskuto en la "Lingva Konsultejo" facebook-grupo pri kiel akuzativigi fremdajn vortojn, kiuj kutime estas markoj. Ĉu oni devas diri "Mi amas Duolingo" aŭ "Mi amas Duolington". Ĉu ni devas aldoni la "-o" finaĵon al vortojn kiuj ne finiĝas kiel la esperantaj substantivoj? Ekzemple, ĉu ni diru "Mi volas Samsung" aŭ "Mi volas Samsungon"?

Se la vorto finiĝas per "o" tiam ne estas problemo. Ni povas rekte aldoni la akuzativ-finaĵon. Se ne, ni povas ankaŭ aldoni la "-o" finaĵon antaŭ ola la akuzativo. Ekzemploj:

"Mi amas Duolingo-n"

"Mi volas Samsung-on"

"Mi malamas Donald Trump-on"

tamen en la samaj okazoj oni ankaŭ povas prezenti al si bonecon eksterordinaran kaj uzi por ĝi vorton apartan tiel same, kiel oni faras preskaŭ en ĉiuj lingvoj. Laŭ mia opinio ni devas esti tre singardaj nur en tiaj okazoj, en kiuj ni povus ricevi aŭ senduban, por niaj oreloj malagrablan, eraron kontraŭ la lingvo, aŭ tute malĝustan sencon; sed en ĉiuj aliaj okazoj tro granda severeco kaj katenado estas superflua. En tiaj okazoj, kie kelka libereco alportas al ni nenian malutilon, kial ni devus senbezone nin malliberigi?

Respondo 38, La Revuo, 1908, Majo

Pri la vorto «ero»

Efektive estus pli bone, se por la ideo de tempokalkulo ni uzus ian alian vorton anstataŭ «ero», kiu havas jam difinitan signifon en la Universala Vortaro. Sed ĉar la vorto «ero» en la senco de tempokalkulo estas vorto pure internacia, tial laŭ la §15 de nia fundamenta gramatiko ni havas plenan rajton ĝin uzi. Ĉar la «ero» de la Universala Vortaro kaj la «ero» science internacia havas tro malsamajn signifojn, tial ni ne bezonas timi, ke oni ilin iam reciproke konfuzos. Cetere, se la vorto «ero» laŭ la §15 de nia gramatiko estas plene permesata, ĝi kompreneble ne estas deviga, kaj ni havas plenan rajton uzi anstataŭ ĝi «tempokalkulo» aŭ ion similan, kion proponos niaj specialistoj.

Respondo 24, La Revuo, 1907, Aŭgusto

Gramatiko

Mi ĉiam provas aldoni streketon antaŭ la finaĵon, kaj en nom-parom mi metas la finaĵon en la dua vorto.

Mi kutime ne ŝatas uzi esperantigitajn fremdajn nomojn ekzemple mi ne ŝatas diri la vorton "vizaĝlibro" anstataŭ "facebook".

Plue mi neniam ŝatas uzi akuzativon kiel jene:

"Mi legis la Ŝtonan Urbon"

"Mi legis la Stone City-on"

sed mi provas aldoni alian vorton kiu prenos la akuzativon, ekzemple:

"Mi legis la libron 'Ŝtona Urbo' "

"Mi aĉetis la libron 'Stone City' "

Oni ĉiam povas trovi tiajn rimedojn. Alia ekzemplo





Bigoso (pole: bigos) estas tre populara plado en Pollando. Plej ofte ĝi estas preparata kaj manĝata vintre. Ĝi estas deviga plado ĉe lignofajro dum vintraj sledaj amuzveturoj. Bigoso estas "peza" por la stomako, sed bongusta. Ĝia gusto pliboniĝas, se ĝi estas kelkfoje revarmigita. Ĉiu dommastrino havas proprajn receptojn por bigoso. Do, la sama plado povas gusti iomete diverse depende de ingrediencoj kaj spicoj, kiujn oni uzas. Kiam mi preparas la pladon, ĉiujn ingrediencojn mi mezuras per miaj okuloj, kaj mia lango donas al mi informojn, kio mankas. Oni povas manĝi bigoson kun pano aŭ kun kuiritaj terpomoj.

Ingrediencoj

1 kg da acidbrasiko
 0,5 kg da freŝa blanka brasiko tranĉita vermiĉele
 1 karoto tranĉita je kubetoj
 1 cepo tranĉita je kubetoj
 300 g da porka viando sen ostoj tranĉita je pecetoj
 300 g da fumigita kolbaso tranĉita je pecetoj
 200 g da kruda fumigita ventrolardo tranĉita je kubetoj

10 sekigitaj/fumigitaj prunoj
 50 g da tomata pureo
 125 ml da ruga vino
 3-5 sekigitaj fungoj (boletoj aŭ brunaj kserokomoj aŭ suiloj)
 salo, muelita pipro, sukero, dolĉa papriko (laŭ gusto)
 2-3 laŭraj folioj
 5-6 juniperaj grajnoj
 5-6 grajnoj da pimento

Preparado

1. Lavu en akvo acidbrasikon, se ĝi estas tre acida – lavu ĝin kelkfoje.
2. Kuiru ambaŭ brasikojn en apartaj potoj en malgranda kvanto da akvo. Se ĝi elvaporigoŝos, aldonu po iomete plian akvon.
3. En pato fritu ventrolardon. Kiam la fritladeroj estos helbrunaj, forprenu ilin kaj fritu de ĉiuj flankoj viandon. Sekve forprenu la viandon kaj fritu cepon ĝis "ora" koloro. Se ventrolardo estos ne tro grasa aldonu 3-4 kulerojn da kolza/sunflora oleo.
4. La fritladerojn, viandon, cepon kun postfrita graso, karoton, fungojn kaj prunojn aldonu en poton, kie kuirigoŝos freŝa brasiko.
5. Kiam brasikoj estos molaj miksu ilin en pli granda poto, aldonu kolbason, spicojn, tomatan pureon kaj vinon.
6. Kuiru dum ĉirkaŭ 10 minutoj, kelkfoje miksante, por ke ĝi ne karboniĝu.

Bonan apetiton!

Nina Pietuchowska

Fonto: **La Ondo de Esperanto**, 2017 no: 6 /272)
 paĝo 60

povus esti:

"Mi ŝatas la retejon de Duolingo"

"Mi ŝatas la lernadon en

Duolingo"

aŭ

"Mi ŝatas la trinkaĵon Koka-Kolao"

sed laŭ mi pli bone estas diri

"Coca-Cola" kaj ne esperantigi la markon.

Kompreneble estas diversaj

opinioj sur tiu temo kaj mi

rakontis nur pri mia opinio.

Vasil Kadifeli

Esperanto Revuo nun havas novan retejon: <http://revuoesperanto.org/>

Gramatiko



Ŝercoj



Konata franca komikulo Fernandel, antaŭ sia famiĝo kiel aktoro, perlaboris sian panon dum multaj jaroj kiel librotenisto. Je demandoj kiel li povis realigi tiajn monotonajn laborojn,

li ekscite respondis:

- Neniel ĝi estis monotona profesio. Vidu, en ĉiuj miaj kalkuladoj ĉe multiplikado mi neniam ricevis la saman rezulton!

-
- Sinjorino, kial vi volas eksedziĝi?
 - Mia edzo traktas min kiel hundon!
 - Kial vi pensas tiel?
 - Li postulas de mi fidelecon!
-

Dum provo la angla verkisto Ŝekspiro rimarkis aktoron parolantan kun bela fraŭlino. Li alproksimiĝis ilin scivoleme kaj aŭdis tion, kion ŝi estis flustranta:

- Je la deka! Ekrapu la pordon trifoje kaj al mia demando "kiu vi estas" respondu: "Riĉardo la tria."

La granda verkisto kiu tre ŝatis virinojn venis iom antaŭ la deka,

eldiris la signalvorton, por ke ŝi enlasu lin eniri la hejmon. Sed je la antaŭe aranĝita tempo venis ankaŭ la amanto. Ŝekspiro malfermis la fenestron kaj teneravoĉe demandis:

- Kiu vi estas?
- Riĉardo la tria - aŭdiĝis la respondo.
- Vi venis malfrue, Vilhelmo la konkerulo jam mastras la fortikaĵon!



el la pola - MRB - 9.06.2015

Kruĉvort-enigmo



Horizontale

1. Direkti malamikan, malfavoran agon al iu ; Membro de grupo, de societo.
2. De dekpiedaj krustacoj, kies unua piedparo portas grandajn, fortajn pinĉilojn, kaj kiuj vivas en maro ; Fratin' de la patro aŭ de la patrino.
3. Objekto (sagoj, osta kubo, bileto kun numero k.a.), kiun oni ĵetas aŭ elektas, kaj laŭ kies hazarda pozicio aŭ indiko oni ion decidas ; Aŭstralia mamulo el la ordo de marsupiuloj, simila al malgranda urso, kun mallonga nazo kaj sen vosto, grimpanta sur arboj.
4. Ano de gento, loĝanta en centra Azio, precipe en Ĉinio, norde de Tibeto ; (inverse) Finaĵo de verbo uzata por "futuro".
5. Tiu momento de la matena krepusko, kiam la ĉielo ruĝiĝas ; Pli-malpli ruĝa svelaĵeto, pli-malpli longe videbla sur la haŭto.
6. Sufikso montranta kolektivecon kaj uzata por derivi el numeraloj aŭ kvantaj vortoj adverbojn aŭ adjektivojn signifantajn «ĉiuj kune», «en grupoj de» ; Element', Au, atomnumero 79, atommaso 196,97.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												

7. Tiu metal', rigardata kiel tre multevalora kaj tial uzata en juvelarto, monfabrikado ks ; Adoranto de statuo honorata per privata aŭ publika kulto.
8. Maniero kiel per la verkoj de la homo esprimiĝas lia percepto de la belo ; Spec' de ekvo (Equus asinus) proksime parenca al ĉevalo, sed kun longaj oreloj.
9. Japana versoformo, konsistanta en la ripetado de kvin- kaj sep-silabaj versoj, laŭ diversaj kombino ; Speco de sukulentaj plantoj kun longaj, dikaj,

sukplenaj, elbazaj folioj kaj kun tubformaj floroj en grapolo aŭ spiko sur longa pedunklo ; Sufikso signifanta membron de grupo.

10. Il', konsistanta el pezaĵo kaj ŝnuro, servanta al la masonisto por determini la vertikalecon, aŭ al la maristo por mezuri la profundecon de akvo, lago, maro ; (Inverse) Tempomezurunuo, egala al la daŭro de unu kompleta rondiro de Tero ĉirkaŭ la Suno ; Partikulo, signifanta «pli ol sufiĉe; pli ol necese; pli ol ĝustamezure».

Vertikale

1. Manĝaĵo konsistanta el viando, muelita, spicita kaj enŝovita en pretigitajn maldikajn intestojn ; Individu', kies ecoj ne estas menciitaj (do ofte kun pejorativa nuanco).
2. Unuo de elektra rezistanco en la internacia sistemo de mezurunuoj ; Speco de mamuloj el la ordo de ronĝuloj, parencaj al la musoj, sed pli grandaj kaj kun tre longa vosto.
3. La tuto de tio, kio ekzistas aŭ okazas sen interveno de la homo ; Disk', turniĝanta ĉirkaŭ akso kaj uzata por ebligi aŭ faciligi movadon.
4. Granda urbo en Malgrandazio, kiu estis dek jarojn

sieĝata de la helenoj ; Persono aŭ objekto, kiun oni submetis al iu procezo.

5. La 21-a grafemo de la E-a alfabeto ; Nomo de mezurunuoj por temperaturo.
6. Piedvesto, ordinare leda kaj alĝustigita, kovranta la piedon nur ĝis la maleoloj ; Kolekt' de objektoj de nia percepto aŭ pensado, konsiderata kiel finita tuto.
7. La 26-a grafemo de la E-a alfabeto ; Onomatopeo, imitanta bebon ankoraŭ ne parolantan.
8. Kolora likvo por skribi, presi aŭ desegni ; Izolaj lokoj, verdaj kaj kvazaŭinsulaj meze en la dezerto, kaj kovritaj de vegetaĵoj pro ekzisto de fontoj.
9. La 15-a grafemo de la E-a alfabeto ; Vola aŭ senvola, pli-malpli longa ĉeso de la spirado.
10. Ŝtat' de Usono ; Suikso almetiĝanta al numeraloj kaj uzata por derivi vortojn, indikantajn unu el la egalaj partoj de tuto.
11. Poliamida rezino, uzata ĉefe por fari fortikajn teksaĵojn ; Sufikso esprimanta kolekton de samspecaj ekzistaĵoj aŭ objektoj, formantaj unu tuton.
12. Frakcio kun numeratoro egala al unu ; Parto de la korpo, adaptiĝinta al speciala vivofunkcio.

(la solvo en la lasta paĝo)

8 kuriozaĵoj pri ridado kaj ĝiaj bonfaroj al sano

Ridado estas multe pli ol elmonro de feliĉo. Tiu gesto simpla — kaj kontaĝa — alportas serion da bonaĵoj al sano, ĉu vi scias? Portalo Bona Volo listigis kelkajn kuriozaĵojn, kiuj pruvas, kiel bona ridego helpas, ke ni havu bonan vivkvaliton.



1. Ĝi estas unu el la malmultaj universalaj gestoj. Salutoj povas prezenti malsamajn signifojn en malsamaj regionoj en la mondo, sed ridado estas elmonro de ĝojo ĉie sur nia mondo!
2. La korpo laboras pli multe por sulki la frunton ol por rideti. Por esprimi zorgemon, ni uzas pli da muskoloj ol por esprimi feliĉon.
3. Kiam ni ridas, ni movas 12 vizaĝajn muskolojn. Kiam ni samtempe parolas kaj ridegas, tiu kvanto kreskas al 84! Kaj tiu vizaĝoekzerco streĉas la haŭton kaj povas prokrasti aperadon de haŭtsulketoj.

4. Kiam vi larĝe ridas, malpliĝas la niveloj de kortizolo kaj adrenalino en la sango — hormonoj de streso — kaj nia cerbo komencas produkti endorfinon, nome substancon, kiu malstreĉas nin. Tiel, la korpo produktas pli da defendoĉeloj kaj plifortigas la imunsistemon. Ridi eble estas plej bona kuracilo

5. Esploro farita en Svedujo science pruvis, ke ridado estas kontaĝa. Ĉu vi scias, kial? Kiam ni vidas ridantan personon, tiam ankaŭ nin kaptas tiu emo. Ridado vere kontaĝas!

6. Se vi ridas dum po 10 ĝis 15 minutoj ĉiutage, tiam vi konsumas po 10 ĝis 40 kalorioj.

7. Nelonga interparolo inter geamikoj, kiu daŭras proksimume 10 minutojn, kaŭzas mezume 5 ĝis 8 ekridojn.via GIPHY

8. Ridado plialtigas memestimon kaj alportas sinsekvon da agrablaj sentoj, kaj helpas forigi negativajn sentojn, kiel malĝojo kaj eĉ depresio.

Ridado kontaĝas kaj estas bonega signo, ke feliĉo ĉeestas dum viaj tagoj!

Nathan Rodrigues

Fonto: **BOAVONTADE.COM**
<https://goo.gl/Vr0GWh>



Tekrar merhaba,

Bu ay da olağan kursumuza devam ediyoruz. Kursumuz çok basit bir kitap olan Avustralyalı G.Gladstone Solomon'un "Esperanto por infanoj" adlı 1934 basımı çok eski bir kitaptan. Her ay bu kitaptan bir ders çalışıyoruz. Bu derslerin sonuna yeni ekler, kelimeler ve dilbilgisi ile ilgili kısa notlar veriyoruz. Eski dergilerinizi atmayın çünkü bu dilbilgisi

açıklamalarını bir kere veriyoruz, sonraki derslerde bunları bildiğinizi varsayıyoruz. Aklınıza takılan bir şey olduğunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın.

Hatırlıyorsanız metin içindeki tirelerin ("") kelime ön ve arka ekleri ile birleşik kelimelerin ana kelimelerini gözle ayırtılabilmek için kullanıldığını söylemiştik. Artık basit ekler (fiil, isim, sıfat vs ekleri) için tire kullanmıyoruz, sadece gerçek ön ve arka ekler ile yeni birleşik kelimeleri ayırıyoruz.

LECIONO PRI "ET" KAJ "EG"

Ĵun tagon Fraŭlino Saĝa klar-ig-is al la infanoj la signifon de la sufiksoj "et" kaj "eg".

"Et" signifas malgranda, kaj "eg" signifas tre, tre granda.

"Nu" diris la maljuna griza muso, "mi havas bonan ekzemplon."

Ŝi malfermis sian pupitron kaj elprenis tri pecojn da ŝnuro. La unua peco estis maldika; la dua estis dika, kaj la tria estis tre dika.

"Nu," diris ŝi, "la dika peco estas ŝnur-o; la maldika peco estas ŝnur-et-o; kaj la tre dika peco estas ŝnur-eg-o. Ĉu vi komprenas tion?"

"Jes, Fraŭlino, ni bone komprenas."

"Do, vi donu ekzemplon, Ŝila!"

"Ni loĝas en dom-o; la ĝardenisto loĝas en dom-et-o, kaj mia riĉa Onklo Alberto loĝas en dom-eg-o."

"Bone! Johano, ĉu vi povas doni ekzemplon de la diferenco inter 'et' kaj 'eg'?"

"Certe! Mi estas mus-et-o; mia patro estas mus-o, sed mia Onklo Alberto estas mus-eg-o."

La aliaj infanoj ridis laŭte. Ankaŭ Fraŭlino Saĝa ridis. Ŝi bone konis Onklon Alberton. Li estis tre lerta kaj tre bona muso, sed certe li estis tre granda. Jes, li estis mus-eg-o!!

"Ĉu vi ĉiuj nun komprenas la diferencon inter 'et' kaj 'eg'?" demandis la instruistino.

"Jes, ni komprenis," respondis ĉiuj infanoj.

"Kion vi preferas, Johano - lerni poemeton aŭ pomegon?"

"Ho, poemeton. Certe ne pomegon," respondis la knabeto.

"Lernu, do, ĉi tiun poemeton:

Ba, ba, ŝafo, ĉu vi havas lanon?

Jes, tri sakojn: prenu en la manon.

Unu por la mastro, unu por mastrin',

kaj unu por la eta knabo ĉe la strata fin'."

Johano lernis ĉi tiun poemeton post kvin minutoj. Estis tre facile.

ALIAJ POEMETOJ

1

Pomo, pomo,

Bela nomo,

Dolĉa frukto vi;

Se mi estus reĝo,

Mi sidus sur seĝo,

Kaj manĝus pomojn tri!

2

Brilu, brilu eta stel',

Diamanto sur ĉiel'!

Diru, kio estas vi,

Tiel alta super mi?

Sözlük		klarigi	bir ŝeyi netleŝtirmek	pupitro	kürsü, öğretmen masası
diamanto	elmas	koni	bilmek	reĝo	kral
diferenco	fark	maldika	zayif	riĉa	zengin
dolĉa	tatlı	poemego	büyük şiir	stelo	yıldız
ega	büyük	poemeto	küçük şiir	strata fin	sokak sonu
eta	küçük	poemo	şiir	tre	çok
klara	net				

Ekler:

- eg- kelimeye büyüklük anlamını verir
- us fillere dilek, şart formunu verir (maĝus:yerdim, yeseydim - sidus: otururdum, otursaydım)

Dilbilgisi:

Esperanto'da basit fiil zamanları çok basittir. Daha komplike zamanları ifade etmek için ulaĉlar ve ortaĉlar kullanılır.

Basit zamanlar ve ekleri ŝunlardır:

Ŝimdiki zaman	-as	Mi iras (gidiyorum)
Geçmiş zaman	-is	Mi iris (gittim)
Gelecek zaman	-os	Mi iros (gideceğim)
Dilek/istek/emir formu	-u	iru! (git!)
Varsayım formu	-us	Mi irus.... (Giderdim...)
Mastar formu	-i	iri (gitmek)

Ni devas legi pli multe

Paulo Sergio Viana

Kiam oni pensas pri la plej grava inventaĵo en la historio de la homaro, oni tuj pensas pri la rado. Mi pensas pri lingvo en skriba formo. Ĉu vi povas imagi la mondon sen tekstoj?

Eble la plej antikva skribaĵo estas la Epopeo de Gilgamesh. La argilaj objektoj kiuj enhavas mitologian rakonton pri homo, kiu defiis la diojn, estis faritaj ĉirkaŭ 2000 jarojn a.K.. Dum 4000 jaroj la homoj skribas, sencese. Certe tio estas grava fenomeno, ĉu ne?

Jam de longa tempo oni elstarigas la efikon kaj valoron de legado por la mensa sano. Novaĵo estas, ke lastatempe neŭrologiaj esploroj pli kaj pli detale montras la manieron, kiel la cerbo reagis dum legado. Ĝi funkcias ja kiel komplika, multfaceta ekzerco, kiu tenas la cerbon aktiva kaj lerta. Lastatempaj sciencaj esploroj montras, ke ni devas legi pli multe, por nia propra bono.

Kiam oni legas, certa kvanto da cerbaj procezoj aktiviĝas: perceptado, memoro kaj rezonado. Aktivas precipe la maldekstra duono de cerbo, kiu respondas pri lingvokapablo kaj analizokapablo. Sed la tuta cerbo laboras. Dekodigado de literoj, vortoj kaj frazoj estas plenumataj de la cerba kortekso; la okcipita kaj tempia regionoj rekonas la signifon de vortoj; la frunta regiono funkcias por la sono de vortoj; hipokampo kaj la meztempia regionoj uziĝas por elvokado de memoroj; rakontoj kaj emociaj enhavoj aktiviĝas la cerbajn migdalojn kaj aliajn emociofunkciajn lokojn; rezonado pri la legata materialo koncernas la postfruntan kortekson.

Tia multflanka cerba laboro plibonigas la rekonkapablon kaj la inteligentecon. El la Universitato

de Toronto, en Kanado, studaĵo montris, ke aparte utila estas legado de fikciaj tekstoj. Tia literaturo estas speco de scenigo, en kiu la leganto mem kvazaŭ interagas. Tiaj tekstoj pritraktas homajn mensojn kaj faras, ke legantoj plibonigu sian kunsentemon kaj komprenemon rilate aliajn homojn. Modernaj aparatoj montras, ke specialaj regionoj en la cerbo, ligitaj al emocioj, aktiviĝas. Inter aliaj bonaj rezultoj, legado de fikciaĵoj povas ekzemple malpliigi antaŭjuĝojn kontraŭ aliaj homoj.

Legado influas ankaŭ en la konservado de rememoroj, kiuj funkcias kiel veraj travivaĵoj.

Ankaŭ legado de poemoj estas tre stimula, precipe kiel ekzerco pri subjektiveco kaj interpretado de simboloj.

Resume, la kutimo legi estas fakte tre saniga por la menso. Ĝi devas komenciĝi en la infana ago. Kaj maljunaj homoj devas zorgi pri siaj okuloj, por ke tiu plezuro daŭrŭ kiel eble plej longe. Ĉiam estas tempo por novaj pensoj kaj lernado.

Feliĉe, vasta stoko da bonegaj libroj en Esperanto estas disponebla. Cetere, ekzistas interesa programo en Esperantujo, kiu rilatas al legado de libroj kaj meritas cies atenton: la Esperanto-Sumoo, iniciatita de la japano Hori Jasuo. Vizitu la retejon:

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl>



(Prelego farita en la kulturkunsido de EASP, je la 25-a de marto 2017)

Fonto : Lampiro #144 - 2017.2

LA UNUA ESPERANTISTA KOSMONAŬTO

La unua esperantista Kosmonaŭto ekveturis al la kosmo antaŭ 37 jaroj

Malmulte estas konate, ke s-ro Farkas Bertalan, la unua hungara kosmonaŭto estis samtempe ankaŭ la unua esperantista kosmonaŭto, ja kelkajn jarojn pli frue dum iu sovetunia ĉaspilota trejnado - kvankam nur laŭ amika vetado - tamen li ne nur ellernis Esperanton en normala konversacia nivelo, sed ankaŭ uzis ĝin.

Lia instruisto pri Esperanto estis alia hungara ĉaspiloto, tiu s-ro Horváth József, kiu kelkajn jarojn poste iĝis aŭtoro de la legende fama en Hungario lernolibro "Esperanto - en 30 tagoj".

Pri la Esperanta lingvosocio de Farkas Bertalan tiutempe raportis nur la revuoj "Hungara Vivo" kaj "SAT-Amikaro", la mencio de Esperanto tamen plene mankis en la oficialaj raportoj, vivresumoj, informiloj, tiun informon la tiama gazetara servo - pro ĝis nun nekonata kialo - simple ne menciis aŭ prisilentis.

Kapaniŝ - Fermo



Bir Temmuz sayısı da böyle bitti ! Eğer okuyorsanız dilinizin gelişmesine katkıda bulunuyorsunuz demektir. Ayrıca Eperanto-Sumoo organizasyonuna da katılıp kitap okumaya çalışmalısınız. İki ayda bir yapılan bir etkinlik Sumoo. Bunu dışında kısa metinler yazmalısınız, mesela fıkra tercüme edebilirsiniz, ya da dergimize bir şeyler karalayabilirsiniz.

Umuyoruz ki Temmuz sayımızı okudunuz ve hoşunuza gitti. Sonraki sayıda buluşmak üzere,
Hoşçakalın !

Tiel ni alvenis en la fino de la julia revueto. Se vi legas, tio signifas ke vi faras kontribuon al la plibonigo de via lingvo. Krome vi devas partopreni la Esperanto-Sumoo organizaĵon kaj legi librojn. Ĝi estas organizaĵo kiu okazas ĉiu dua monato. Vi ankaŭ devas traduki malgrandajn tekstojn. Ekzemple vi povas traduki ŝercojn aŭ vi povas pretigi malgrandajn tekstojn por nia revueto.

Ni esperas, ke vi legis nian julian revueton kaj ĝuis ĝin. Ĝis nia venonta numero,
Ni adiaŭas vin !

La kosma vojaĝo de s-ro Farkas Bertalan enkadre de la internacia projekto Interkosmo komenciĝis ĝuste antaŭ 37 jaroj, la 26-an de majo en 1980. Enkadre de la projekto Interkosmo la Sovetunia Kosma Ministerio ebligis spac-veturadon po unu kosmonaŭto de ĉiuj tiamaj socialismaj landoj.



Aldone vi trovas la artikolon kaj intervjuon kun la kosmonaŭto en la revuo Hungara Vivo, n-ro 1/1981.

Szilvási László



Solvo de la krucvort-enigmo

O	R	T		J	A	R	O		D	O	L	10
N	A		O	O	A	L	A		O		T	9
A		N	E	Z	A		O	T	A	R	A	8
G		O	N	A	L	O	D	I		R	O	7
R	O		P	O		A		O				6
O	N	O	A	K		R	O	R	O	R	A	5
	O	S		O	R	O	J	U	J			4
O		A	L	O	K		Ŝ		O	T	O	3
	N		L	I	N	K	O	N	A	R	O	2
	O		A	N		I	A	Ŭ	A	R	T	1
12	11	10	9	8	7	6	5	4	3	2	1	